


NORDFRANCA

ESPERANTISTO

(PIKARDA STELO - NORDA GAZETO - ANTAŬEN)



MONATA REVUO

de la Nordfrancaj Esperantistoj

Publikigas la sciigojn de la Norda Federacio
kaj de la Grupoj

REVUE MENSUELLE

des Espérantistes du Nord de la France

Publie les renseignements
de la Fédération du Nord et des Groupes



Redaktejo kaj administrejo :

18, rue Albert I^{er} - DUNKERQUE (Nord)

C. VERNAY, Direktoro-Prirespondanto

G. VANHOVE, Administranto


Redakla Komitato, redaktas

Jarabono : Francujo 10 frankoj

aliaj landoj : 8 respondkuponoj aŭ egalvaloro

POŬTĈEKKONTO : LILLE 403-50

G. VERNAY, DUNKERQUE

 Les bonnes adresses de Dunkerque...

KODAKS
PHOTO-AMATEURS

CAYEZ

9^{bis}, Rue Clémenceau - DUNKERQUE

Travaux - Agrandissements
Stocks de toutes marques
Esperanto parolata

ATELIER DE RELIURE ET CARTONNAGE
(Fondé en 1860)

Louis BLOT

10, Rue Dupouy, DUNKERQUE

Reliure en tous genres
de luxe et d'amateur
Esperanto parolata

IMPRIMÉS EN TOUS GENRES - PAPIERIE

RELIURE - GRAVURE

Fournitures classiques et de bureau

Librairie du Beffroi

Albums et Timbres pour Collectionneurs
Livres - Insignes Espérantistes

MOREAU-FOURMEUX

28, Rue Clémenceau, DUNKERQUE

"Au Roi du Saucisson"

Roger BRATS

30, Rue Michelet

COUDEKERQUE-BRANCHE

Fromages, Conserves, Confitures

Vente sur tous les Marchés de la Région

Fabrique de Casquettes

BÉRETS - CHAPEAUX

EDMOND

Chapelier

38, Rue Poincaré - DUNKERQUE

"Les BLEUETS"

26, Rue Poincaré - DUNKERQUE

Blanche RAMOUT

Fleuriste

Vous y fournir, c'est affirmer votre bon goût

Choix de Plantes - Corbeilles

Gerbes et Bouquets

Les Coopérateurs
de Flandre et d'Artois

3, route de Bergues - Coudekerque-Branche

La Coopération est le moyen idéal de
répartition des produits de consommation

Adhères tous à la Coopérative pour défendre
vos intérêts

Depuis sa fondation, notre Société a payé
à ses adhérents plus de 40 millions francs
de ristournes et d'allocations (naissances,
maladies, décès).

*La Coopération est un Syndicat
de Consommateurs*

LES COOPÉRATEURS vendent à tous :
actionnaires ou non

Nos magasins sont ravitaillés chaque matin
en PAIN d'excellente qualité (vendu 0 fr. 10
au-dessous de la taxe officielle).

en LAIT FRAIS PASTEURISÉ.

Tout l'HABILLEMENT

Hommes, Jeunes Gens
Enfants

AU BON VÊTEMENT

Maison O. ROZEN

17, Rue des Chaudronniers

DUNKERQUE

Esperanto parolata

BIJOUTERIE

Georges MAEGHT

9, Rue Clémenceau, DUNKERQUE

Choix énorme de Bagues de fiançailles

Alliances et Cadeaux de mariages

Rabato al niaj Samideanoj

NORDFRANCA ESPERANTISTO

Monata Revuo de la Nordfrancaj Esperantistoj

2 a Serio - 15 a Jaro

N° 9-10

JULIO-AUGUSTO 1938

2 et 3 Juillet

TOUS A DUNKERQUE
pour la réunion fédérale !

Samedi soir 2 Juillet :

Grande Fête Espérantiste d'Été à Malo-les-Bains (Hôtel de Ville).

Dimanche 3 Juillet : *Venez nombreux !*

Inauguration de la Rue Zamenhof à Rosendaël
et de la 4^{me} Semaine Internationale à Malo (du 2 au 10 Juillet).



M° GASTON DEGAND

*Advokato, Doktoro pri leĝoscienco,
Prezidanto de la Grupo Esperantista en Dunkerque
unanime elektita, dum la kongreso en Lens
kiel Prezidanto de la Nordfranca Federacio.*

La Prezidanto parolas...

NIA FEDERACIO

Kio estas nia federacio ? Ĝi estas la unuiĝo de la memstaraj esperantistaj grupoj de Norda Francujo, tio estas de la departementoj Nord, Pas-de-Calais kaj Somme. Ĝi estas komuna interligilo, kies celo estas zorgi pri la kunagado de la esperantistaj organizaĵoj de nia amata kaj laborema nordfranca regiono. Ĝia celo estas ankoraŭ pliproksimigi unu al la aliaj, ĉiujn esperantistojn, ĉu ili estas anoj de iu grupo, ĉu eĉ izoluloj, en ĉiujraj kunvenoj, tiamaniere ke ĉiuj interkonatiĝu kaj estu amikaj samideanoj, sinceraj adeptoj de nia helplingvo, sindonemaj kunlaborantoj por ĝia disvastiĝo.

Kaj ĉio-ĉi estas nepre necesa. Efektive, kio estus en Norda Francujo, la esperantista movado se neniu ligilo ekzistus inter niaj grupoj, se neniu kunveno, neniu kongreso okazigus ? La respondo estas facila. Ni ĉiuj restus senfortaj nekonataj unuopuloj. Male, se ni estas preme kuniĝitaj, en la kadro de nia Federacio, se ni kune kaj kuraĝe laboradas samspirite, ni estos pli kaj pli fortaj. Ni iĝos bona ekzemplo imitinda kaj laŭdinda ne nur en nia patrolando, sed ankaŭ en tuta Esperantujo.

Sed por atingi tiun celon kaj efektiviĝi tiun altan idealon, estas necesge, ke ĉiu el ni, persiste laboradu. Senlabore, nenio estas ebla. Laborante ĉio iĝas ebla. Fido naskas miraklojn, kiam ĝi estas profunde enradikiĝinta en sinceraj kaj sindonemaj koroj. Tiam fidon mi deziras vidi en ĉiu nordfranca esperantisto, en ĉiu el niaj grupoj.

Kiam de nelonge, en Lens, niaj federacianoj unuanime honorigis min, opiniante min inda esti ilia prezidanto, mi sentis, dum mia dankparoladeto, ke vivas en multaj brustoj, sincere sindonema sento por nia komuna agado. Do mi insiste, elkore kaj amikece alvokas ĉiujn al laboro, al kunlaboro, al kunlaborado. Ke ĉiu, en sia koncerna sfero, instruu, propagandu, varbu novajn adeptojn ; ke ĉiu grupo plimultigu siajn anojn, klopodu por plialtigi la ĝeneralan esperantistan nivelon, por helpi min kaj la federaciajn komitatanojn, alproksimigi al la celo, efektiviĝi nian taskon. Certa mi estas, ke tiu alvoko trafos viajn korojn. Kaj tiam, la estonteco estos nia. Tiam ni vere indos ĉies laŭdojn, ĉar tiam, ni ankaŭ rajtos fieri.

G. DEGAND.

Sursum Corda !

Ni plinobligu niajn korojn ! Atentu, karaj Samideanoj, malnova Esperantisto deziras diri kelkajn vortojn al vi pri nia afero. Kial ? Ĉar tiu malnovulo ĵus relegis por *Nfe* aron da kronikoj de gazeto aperanta antaŭ tridek jaroj, tio estas la bonega "La Revuo". Amiko Vernay diris efektive al mi, ke li tre ŝatas tiajn ĉebetojn ; foliumante por li la tiutempajn legaĵojn mi denove konstatis, ke, jam, la antaŭuloj uzis samajn entuziasmajn esprimojn, kaj ĝoĝiĝis pro similaj rezultatoj. Sajnas ke oni povus uzi la samajn kliŝojn, nur ŝanĝante la datojn...

Kaj iom post iom, oni melankolie pripensas. Ĉu tiom da klopodoj estis, estas kaj estos senutilaj ? Ĉu la miloj da laborhoroj, ĉu la miloj da vortoj, da skribaĵoj, da penoj senrezulte enprofundiĝos en la eternecon ? Ĉu eble ? Sur la tuta terĝlobo, en plej diversaj landoj, homoj

kuniĝas, kiuj havas similan idealon : ili iras kun rigardoj fiksitaj sur verda stelo. Miloj da semoj ili jam disŝutis, nur kelkaj floretoj aperis. Ĉu la laborantoj devas senkuragiĝi ? Ĉu ili devas forjeti la tenilon post la hakilo ? Ne, tute ne. Iliaj penoj estos rekompencitaj, pli lumaj tagoj venos.

Skeptikuloj opinias, ke la laboro estos vana, senfrukta. Aliaj ne sufiĉe malproksimen rigardas : ili volus tujan plenumon de siaj deziroj. Dolorigaj batoj certe frapas la movadon. En regnolandoj, kie tamen ekzistas klareco, la helpa lingvo estas forpuŝata, severe malpermesata. Kiu el la veraj Esperantistaj, antaŭ kelkaj semajnoj, ne eksentis sian koron emociopremitan, pro antaŭvido de novaj limigaĵoj en regnolando, kie Esperanto estis ĝis nun tiel althonore lokita ?

Tio estas malgrava epizodo en la historio. Ni jam spertis tion : post ankaŭ severa malpermeso nia ideo estis denove konsiderata laŭ ĝia ĝusta alta valoro. Malbonaj kreskaĵoj estas kelkfoje malfacile forigeblaj el niaj ĝardenoj : dank'al persistega laboro la ĝardenistoj tamen sukcesas venki kaj anstataŭi ilin per utilaj produktoj. Nuntempe, la homaro travivas malgajigajn horojn, kies kialojn oni ne volas diskuti ĉi-tie. Esperantistoj, ni fiere levu la kapon, ni senhalte laboru. En Nordfranca regiono, la grundo estas favora : tie kreskas ankaŭ arbeto. Vi-mem zorgu pri ĝi ! Alportu vian bonvolan helpon al la ĝardenisto, kiu ĝin kulturas. Imagu nur la necesan laboron : vi certe konsentis senhezite malgrandan oferon, utilan oferon. La redaktoro laboras ĉiam ridetante : memoru lian kuragon kaj ekhontu se vi ne ankoraŭ subtenis lin.

Ĉiu Esperantisto el Norda Francujo devas legi, devas aboni sian gazeton.

P. B.

Journée Fédérale du 3 Juillet à Dunkerque

INAUGURATION DE LA RUE ZAMENHOF

Rosendaël (la vallée des roses) qui constitue comme Malo-les-Bains, en quelque sorte un quartier du grand Dunkerque, invite cordialement tous les espérantistes de la région du Nord et des pays voisins à l'inauguration officielle de la rue Zamenhof le 3 juillet prochain.

M. le Maire a déclaré vouloir donner le plus d'éclat possible à cette manifestation si les espérantistes veulent bien y participer en très grand nombre.

Rosendaël, importante cité de 16.000 habitants, au magnifique Hôtel de Ville est particulièrement digne de recevoir votre visite.

Le samedi soir 2 juillet, à 20 h. 30, aura lieu la grande fête Franco-Espérantiste en l'honneur du 6^{me} anniversaire de la création du Groupe Espérantiste de Dunkerque et environs. Elle aura lieu dans les salons de l'Hôtel de Ville de Malo-les-Bains (600 places), à 500 mètres de Rosendaël et de Dunkerque. (De 20 h. 30 à 23 heures, partie artistique, de 23 heures à 2 heures du matin, bal à grand orchestre.)

Cette fête magnifique se terminera par un bal des plus animés. L'an dernier le succès en fut considérable.

Dimanche 3 Juillet.

9 h. 45 à 11 h. — Réunion fédérale à Rosendaël (Hôtel de Ville).
11 heures. — Inauguration officielle de la rue Zamenhof à Rosendaël.
11 h. 45. — Réception à l'Hôtel de Ville de Rosendaël par la Municipalité. Vins d'honneur.

13 heures. — Hôtel-pension "Eole", 158, Digue de Mer, à Malo (Tél. 13-25), Déjeuner amical en commun (facultatif), 20 fr. tout compris.

15 heures. — Après le repas, séance officielle de travail. Inauguration du 4^me Cours d'Été de la S.F.P.E.

Remise officielle au Groupe d'Arras, par le Groupe de Pont-sur-Sambre, de la Coupe "Fervorigilo".

Nos samideanoj étrangers profiteront du cours de change actuellement très avantageux, nos compatriotes d'une réduction des frais de voyage de 50 % (tarif stations balnéaires), mais tous profiteront d'heures inoubliables tant pour les plaisirs de la mer, de la plage et des fêtes que de l'atmosphère fraternelle que l'on éprouve toujours dans les congrès et les grandes réunions espérantistes.

Des Vacances Espérantistes

et 4^me Cours d'été de la S. F. P. E.

De nombreux espérantistes, empêchés pour une raison quelconque de prendre part au Congrès international, perdent ainsi l'opportunité de se perfectionner dans la conversation avec des espérantistes étrangers.

Pour remédier à cet inconvénient, la S.F.P.E. organise depuis plusieurs années en même temps que des vacances espérantistes un *cours de révision et de conversation à Malo-les-Bains*, une des plus belles plages de France, sur la Mer du Nord.

Cette année encore la *Semaine Internationale Espérantiste du 3 au 10 juillet 1938*, promet d'être un grand succès.

La perspective de passer huit jours au bord de la mer, à proximité de Dunkerque, véritable cité espérantiste, nous assure la participation de nombreux étrangers, on nous annonce même la venue probable de l'écrivain suédois Stellan Engholm et de plusieurs de ses amis.

C'est pourquoi nous recommandons tout particulièrement à tous et notamment aux samideanoj isolés qu'ils viennent nombreux à l'Hôtel-pension "Eole" où se tiendra ce cours. Cet hôtel tenu par deux ferventes espérantistes est admirablement situé face à la mer et possède tout le confort que l'on peut souhaiter.

(158, Digue de Mer, MALO — Téléphone 1325 Dunkerque)

Le cours sera dirigé par le sympathique professeur suédois Artur Persson, dont on se rappelle les retentissants succès à Besançon, Le Havre, Grenoble, Montpellier, etc...

Le Groupe espérantiste de Dunkerque-Malo a fait coïncider sa fête avec l'ouverture des cours et nous pouvons déjà vous donner un aperçu du programme.

Samedi 2 Juillet. — A partir de 20 h. 30, Grande Fête Franco-Espérantiste dans les Salons de l'Hôtel de Ville de Malo.

Dimanche 3 Juillet. — Le matin, inauguration officielle de la rue Zamenhof et réception à l'Hôtel de Ville moderne de Rosendaël (ville avoisinante).

Judi 7 Juillet. — Après-midi, visite détaillée et pleine d'intérêt du port de Dunkerque (3^me de France) sous la direction d'un samideano, ingénieur du Port.

Tous les jours. — De 10 heures à midi, cours de perfectionnement, l'après-midi, promenades, baignade et distractions sur le sable fin de la plage de Malo.

Le prix pour la *pension complète avec boissons, pourboires et toutes taxes comprises* est seulement de 265 francs pour toute la semaine ou

38 francs par jour pour ceux ne pouvant rester la semaine entière ou, au contraire prolongeant leur séjour, toutefois, sans dépasser le 13 juillet.

Aucune cotisation supplémentaire ne sera demandée pour le cours. Des conditions spéciales sont consenties aux familles.

POUR LES DÉBUTANTS.

C'est surtout pour les débutants, ceux qui ont commencé cette année seulement l'étude de la langue auxiliaire que la S.F.P.E. a créé le cours d'été de Malo-les-Bains.

Ils y auront des révisions amusantes, des exercices de conversations faciles et progressifs, le contact d'étrangers sympathiques et surtout un professeur patient et compréhensif habitué à cet enseignement et connaissant exactement leurs points faibles et la façon la plus aisée d'y remédier.

En une semaine de vacances agréables, vous apprendrez plus que dans bien des cours publics en plusieurs mois.



SAINT-OMER (Pas-de-Calais). — *La Esperanto-fako (1.500 numeroj) oficiale starigata de nia Prezidanto Deligny (L. K.) en la urba Biblioteko, kun aprobo kaj apogo de la urbestro kaj de la lokaj aŭtoritatoj.*

Granda servo por Esperanto

La 10-an de aprilo 1938, nia verda standardo flirtis ĉe la balkono de la urba biblioteko en Saint-Omer, strato Gambetta, okaze de la inaŭguro de esperanta fako en tiu publika instituto.

Grava kaj plensignifa aperos al la esperantista mondo tiu simpla fakto. Ĉar nia lingvo, nia idealo kaj la rezultatoj jam akiritaj ne povas

pli klare kaj daŭre esprimiĝi ol en libroj, kiuj entenas la pensojn kaj la spertojn de niaj diversaj verkistoj. Kiel oni jam diris plurfoje, niaj plej valoraj trezoro kaj propagandilo konsistas ne el argumentoj, statistikoj, ŝtonaj aŭ metalaj monumentoj, sed el esperantaj libroj kaj dokumentoj, kiuj evidentiĝas kaj disvastigas la verkon kaj la spiriton de nia ĝenia Majstro kaj de liaj disĉiploj.

Ne estas do mirige, ke S-ro Generalo Bastien, prezidanto de I.E.L. bonvolis ĉeesti persone la supre diritan inaŭguron. Cetere la eksterordinare riĉa esperanta fako instalita en la urba biblioteko de Saint-Omer meritis tian honoron. Krom 1500 verkoj, el kiuj multaj de la unuaj jaroj de Esperanto, ĝi enhavas valorajn dokumentojn pri diversaj projektoj de internacia lingvo kaj ankaŭ multajn leterojn skribitajn de eminentaj esperantistoj kaj de Dro Zamenhof mem. Al sinjoro Deligny, honorprezidanto de la Nordfranca Federacio, kaj al la heredintoj de S-ro Michaux, organizinto de la unua universala kongreso, ni ŝuldas tiujn trezorajn dokumentojn, pacience kolektitajn de 1887, tiel estas de la naskiĝo de nia lingvo.

Pli ol cent personoj ĉeestis la malfermo de la nova biblioteko, inter kiuj oni povis vidi ne sole malnovajn pionirojn, kiel Sron advokaton Sergeant, kaj Sron Le Petit, el Boulogne, Sron Perrin, el Calais, Sron Humez, prezidanto de la Federacio, Finon Colléatte, vic-prezidantino, sed ankaŭ la Subprefekton de la distrikto, la Urbestron, la Prezidanton de la Civila Tribunalo, la Liceestron, la Inspektoron de la elementaj lernejoj, kaj multajn interesigantojn, ne kalkulante fervorajn samideanojn.

Ĉiuj plezure rigardis la multnombrajn dokumentojn kaj librojn, mirante pri la amplekso kaj valoro de la kolekto, orde arangita de la bibliotekisto, S-ro Deligny, en unu granda fako titolita "Esperanto", ornamita per busto de Zamenhof kaj signalita per oficiala flago de la unua universala Kongreso. De malnovaj elĉerpitaj revuoj kaj broŝuroj al modernaj dikaj hindintaj libroj oni povis sekvi la tutan iradon de la movado kaj mezuri la progreson de la uzado de la lingvo en ĉiuj direktoj.

Sed kio precipe altiris la atenton de la Esperantisto estis sendube la leteroj de la Majstro. Modestaj leteroj skribitaj sur ordinara papero kun la jena stampo "Dro Zamenhof, Varsovio, Str. Dzika, N° 9". Tuj oni rekonis la facilan klaran stilon kaj la altan spiriton de la kreinto de la lingvo. Kun emocio oni legis interalie la manuskripton de la "Preĝo sub la verda standardo" kaj la ne ankoraŭ bone konatan leteron: "Vi petas, ke mi donu al vi la detalojn pri mi kaj mia vivo..." adresitan al S-ro Michaux la 21an de februaro 1905; kaj oni sentis sin tute proksime al la Majstro kaj al la unuaj paŝoj de Esperanto, kiam la "granda afero" estis diskutata, necerta, kaj ĉiuflanke malfacila. Gravaj relikvoj de glora epoko.

Komprenoble plurajn estimindajn paroladojn oni aŭdis. S-ro Deligny, iniciatinto de la starigo de la esperanta biblioteko, salutis la ĉeestantojn. La urbestro dankis la familion de S-ro Michaux kaj rimarkigis la agemecon kaj la kompetencon de S-ro Deligny, kiu multe laboris por la biblioteko. Fine, S-ro Comte, bofilo de S-ro Michaux, post saluto al la memoro de tiu lasta, ĝojis pro tio, ke de nun la valoraj dokumentoj kolektitaj estas ŝirmotaj, same kiel la urba biblioteko mem, kontraŭ ĉiuj difektoj aŭ konfliktoj kiuj povus okazi.

Sekvis gaja tagmanĝo en samideana atmosfero. Ĉirkaŭ granda tablo pli ol sesdek esperantistoj kaj simpatianoj lokiĝis laŭvole. Esperantaj vortoj flugis tra la ĉambro kaj ridoj eksplodis, dum la kelkaj "malfeliĉuloj" kiuj ne komprenis la lingvon provis vane partopreni en la esperanta bonhumoro.

Je la ĉampano, S-ro Humez, levante sian glason pro la sukceso de Esperanto, esprimis la dankon de la Federacianoj, kiuj havas la feliĉon

posedi en sia regiono tiom da interesaj memorajoj kaj instruoplenaj materialoj.

Sro Stuit, nederlandano, asertis, ke en tiu tago nur komuna sento de homara frateco kunigis la ĉeestantojn.

Siajn admiron kaj emociion diris Sro Pragano; rumana samideano kaj Ce-instruisto, kiun la Zamenhofa trezoro de la biblioteko entuziasmigis.

Laste leviĝis Sro Generalo Bastien, prezidanto de la festo. Li unue gratulis sian malnovan amikon, Sron Deligny kaj la familion de Sro Michaux, donacintoj de la mirinda biblioteko. En sprita sed samtempe konvinka parolado, li pretendis kaj pruvis, ke la esperanta movado estas pli juna ol oni komune pensas. Li ĝojis pri la rezultatoj jam akiritaj kaj antaŭvidis efikajn sekvojn en proksima estonto. Plej taŭgajn vortojn li trovis por instigi la samideanojn al pli vigla laboro, ekzaltante la altan idealon, kiun entenas Esperanto. Multaj aplaŭdoj aprobis la ŝatindan parolinton.

Laŭ la kutimo, la kunveno finiĝis per la “Espero” kune kaj tutkore kantita...

— Certe, kiel diras la titolo de ĉi-tiu artikolo, grandan servon por Esperanto faris la malavaraj donacintoj de la nova kaj riĉa biblioteko. Estus dezirinde, ke multaj esperantistoj vizitu ĝin, veran fonton de intereso kaj ĝojo. A. D.

INFORMOJ. — La urba biblioteko de Saint-Omer (strato Gambetta, apud la Liceo) estas malfermata ĉiutage, krom sabate kaj dimanĉe, de la 9a ĝis la 12a.

De la 13a de julio ĝis la 30a de septembro, ĝi estas malfermata nur ĵaŭde matene. Laŭeble, skribu antaŭe al Sro Deligny, bibliotekisto.

PRI URAGANOJ

« Le 29 mars, on a apposé, en gare de Dunkerque, une plaque portant à côté de l'étoile espérantiste l'adresse d'un délégué permanent. » (NfE, page 92.)

Depost tiu dato, inko, salivo, grumbloj kaj ankaŭ laŭdoj (feliĉe!) kvazaŭ elspruciĝis el inkujoj kaj buŝoj de multnombraj samideanoj kaj eĉ de... ŝtatoficistoj!! Sed legu la du sekvantajn artikolojn kiuj temas pri du veraj okazintaĵoj.

LA RED.

Estas pluraj specoj de uraganoj. Victor Hugo majstre priskribis la « uraganon sub kranio »; preskaŭ ĉiutage oni legas aŭ aŭdas pri « uragano en akvoglaso ». Nun, en nia kara Dunkerque' a Grupo ekestis alia speco, tio estas « uragano ĉirkaŭ tabuleto »...

Tuj post lia alveno en la kunvenejon, la agema Sekretario, per iom ekscitata voĉo, klarigas la aferon al la komitatoj. Kaj mi rakontos ĝin al vi plej eble kiel mallonge.

Oni scias, ke pro la nunaj ekonomiaj cirkonstancoj, la registaro decidis uzi ĉiujn eblajn rimedojn por altiri la alilandulojn kaj tiamaniere plivigligi la turismon en nia bela, vidinda lando. Kion devas pensi saĝaj homoj pri tio? Ke estas necesa « fari sagojn el ĉiu ajn ligno » kaj ne malatenti eĉ unu provon. Konvinkita pri tio, amiko H. proponis al la komitato konigi al la interesataj vizitantoj en Dunkerque la eblecon uzi Esperanton, per la almeto en la stacidomoj de tabuleto kun verda stelo, indiko de la delegito, kaj la vorto “*Esperanto*”. Kiam decidita, tuj farita:

la tabuleto bonaspekta, ampleksa ĉirkaŭ $0^{m}40 \times 0^{m}40$ estis ceremonie alfiksita al la muro, post aprobo de la aŭtoritatuloj (oni permesu tiuokaze ne kritikon, sed rimarketon : la loko ŝajnas ne bone elektita. La tabuleto estas ja apud la pordo por eniro al la vagonaro : ĉu ĝi ne devus esti apud la elirejo, tio estas la "en" irejo al la urbo ?).

Kontentanima, la komitatanoj opiniis ke ili plenumis devon, ili konsciis pri la kvazaŭa kreo de fruktodona rivereto, kiu iros pligravigi la "Pactole" baldaŭ riĉigonta la landon per la moneroj de alilandaj vizitantoj... Kaj baldaŭ ankaŭ, ili povis konvinkiĝi, ke ilia verko estas videbla, dank'al letereto, sed, o ve ! Letereto de fiskagento, kiu sciigis al ili ke la tabuleto estas taksebla, ke ili devas pagi sumeton da 10 frankoj ; plue, ĉar ne estis antaŭa deklaro, monpuno da 100 frankoj estis postulata !

Elrevido ! La Paktolo sekigis ! Kvazaŭ ventego, la Sekretario forflugis al la altranga oficisto, S-ro Inspektoro de Aktregistrado, Kvazaŭ advokato, li varme pledis, klarigis ke la ago estas tute senprofita celo, ke la Esperantista grupo deziras nur alporti sian ŝtoneton por la konstruo de la prosperado de la patrujo, k.t.p. Vane ! La moderna Sireno ne sukcesis ensorĉigi la avidan fiskulon ; apenaŭ tiu lasta bonvolis konsenti pri la maltroupeo kaj promesi ke, eble, la monpuno ne estos postulata, 100 frankoj ! Grava truo en la ĉiam tro malplena kaso de la Grupo... Jam 10 frankoj estas konsiderinda sumo, kiam oni ne estas riĉa (malriĉeco ne estas malvirto...)

Nun, la Sekretario iomete koleretas, li projektas skribi al la Ministro, skui ĉielon kaj teron por pravigi la bonvolon de la intenco ; la Prezidanto konkludas ke ĝuste pro tiaj stultaj bagatelajoj la aferoj iras laŭ malbona vojo, kaj estas uragano ĉirkaŭ tabuleto...

Amikoj, kiam vi estos akirintaj la sperton, kiun povas supozigi mia blanka hararo, vi eble opinios pri la negranda utileco de viaj klopodoj. Mi mirus, se vi povus ŝanĝi la pensmanieron de ŝtata oficisto. En ĉiu fako de la administracio, kiun oni envias al nia lando, ili havas okulŝirmilojn, kiuj malpermesas al ili vidi flanken. Sed estu tamen kontentaj, la tabuleto estas videbla...

Barbulo.

APRILA ŜERCO AŬ SERĈO

Tiun memorindan tagon, S-ro Monaĥo, nia ŝatata I.E.L. — delegito, surpinglis sian plej radiantan stelegon. Telefone, li ricevis la taskon akcepti, ĉe la vagonaro, Sron Pragano.

— Jen bona okazo, li pensis, por refoje admiri en la stacidomo la verdstelumitan ŝildon, kie diklitere, kuŝas mia nomo.

Tiel, duoble instigite de esperantisma fervoro, li rapidis kun batanta koro per larĝaj paŝoj en la direkto al la stacidomo.

Tio okazis, se fidindaj informoj trafis min, en la posttagmezo de tiu fatala dato : 1-an de aprilo.

En la atendejo, nur kelkaj vojaĝantoj atendadis.

— Feliĉe, mi alvenis iom tro frue, opiniis nia amiko, kaj por pasigi pli agrable la tempon, li stariĝis antaŭ la nove pentrita stelo, esplorante ĝian regulan kvin-pintecon.

Post 15 minutoj, el tiom pripensiga admirado, S-ro Monaĥo ekkonsciis ke eble li alvenis iom tro malfrue kaj ke certe la invitito atendis iun el nia grupo en iu el la ĉirkaŭaj kafejoj. Tiel pelite de sindonemo kaj de ioma soifo li eniris en la plej proksiman kafejon. La enketo daŭris en kelkaj kafejoj, kie vane serĉis nia serĉanto ian esperantulon.

Hazarde, plej-feliĉe, la bonŝanco tiam aperis antaŭ li en la persono de nia amiko Verda Nazo. — Ho ! Verd nazulo bonvolu akriĝi vian verdan flaron en tiu okazo kaj helpi ke mi trovu nian prelegonton !

Helpeme, kiel ja kutimas en nia movado, proponis pluan pli seriozan esploradon de la trinkejoj, kie nepre devas troviĝi S-ro Pragano.

Post kelkaj horoj, la afero aspektis tute senfrukta, kaj niaj amikoj tute konsoliĝis kaj eĉ forgesis pri sia sensukceso.

Kvankam tiu historio estas tute vera, tamen mi ne kuraĝas aserti ke ĝi finiĝis nur la morgaŭan matenon, sed la fekunda imago de la legantoj de Nord-Franca Esperantisto facile konceptos, kia estus estinta la troviĝo de ili estus serĉintaj tiom longe.

Ĉiam restis inkognita la mistera telefona voĉo misavertinta nian kompatindan delegiton. Kaj la rezulto estis ke la morgaŭon S-ro Pragano alvenis en Dunkerque'o kaj eĉ ne unu ombro de esperantisto akceptis lin ĉe la stacidomo.

M. DELCOURT.
Interrojais

NI DAŬRIGU !...

STRANGAJ STELISTOJ

*(Malnova rakonto de la tempo, kiam ne ekzistis aŭtomobiloj
sed kuris ankoraŭ la poŝveturiloj. Infano rakontas.)*

Ni estis en tiu loko sufiĉe ebena kaj ne malproksime de la domoj. La nokto estis hela, sed dikaj arboj staris ambaŭflanke de la vojo kaj ĵetis sur ĝin de tempo al tempo multe da mallumo. Mi estis sur la sidejo kun la ĵokeo.

La rajdanta poŝveturigisto plimalrapidigis siajn ĉevalojn, turnis sin kaj kriis al la ĵokeo.

— Diru al tiuj sinjorinoj, ke ili ne timu, mi havas bonajn ĉevalojn.

Ne estis necesa, ke tiu parolo estu transigita al mia patrino, ŝi ĝin aŭdis, kaj kliniĝinte al la veturila pordo, ŝi vidis, tiel bone kiel mi ilin vidis, tri ulojn : du sur unu rando de la vojo, la alia kontraŭe, je ĉirkaŭ dek paŝoj de mi. Ili ŝajnis malgrandaj kaj restis senmovaj.

— Ili estas ŝtelistoj ! kriis mia patrino ; veturigisto, ne antaŭeniru ! reiru ! iru returnen ! Mi vidas iliajn pafilojn.

La poŝtrajdanto, kiu estis Franco, ekridis ĉar tiu pafila vizio pruvis al li, ke mia patrino tute ne sciis, kiuj estis niaj malamikoj. Li opiniis, ke estas prudente, ne seniluziigi ŝin, vipis siajn ĉevalojn kaj decide preterflugis antaŭ tiuj tri flegmaj personoj, kiuj tute ne sin delokis, kaj kiujn mi tute precize vidis, sed ne povante diri, kio ili estis.

Mia patrino, kiu ilin vidis tra sia timego, imagis distingi pintajn ĉapelojn kaj rigardis ilin kiel iajn soldatojn.

Sed kiam la ĉevaloj, ekscititaj kaj tre timigitaj siaflanke estis sufiĉe longe kurintaj, la veturigisto igis ilin paŝi kaj deĉevaliĝis por veni kaj paroli kun la vojaĝantinoj.

— Nu, sinjorinoj, li diris ĉiam ridante, ĉu vi vidis iliajn pafilojn ? Ili ja havis iun malbonan intencon, ĉar ili ĉiam staris dum la tuta tempo kiam ili vidis vin. Sed mi sciis, ke miaj ĉevaloj ne faros malsaĝaĵojn. Se ili estus renversintaj nin tie, tio ne estus estinta por ni bona afero !

— Sed fine, diris mia patrino, kio ĝi do estis ?

— Estis tri grandaj montaj ursoj, mia bona sinjorino !

Mia patrino ankoraŭ pli timiĝis ; ŝi petegis la veturigiston reĉeva-

liĝi kaj nin konduki rapide ĝis la proksima tranoktejo ; sed ŝajne tiu homo kutimis tiajn renkontojn, kiuj estus certe tre maloftaj hodiaŭ dum printempo sur la ĉefaj vojoj.

Li diris al ni, ke tiujn bestojn oni devas timi nur en okazo de renverso, kaj kondukis nin al la haltejo sen plua malhelpo.

Koncerne min, mi tute ne timis ; mi jam havis kelkajn ursajn amikojn en mia ludilaro.

ADE.

Eble, vi ne Rimarkis...

Dum la lastaj tagoj de aprilo, la francaj ĉefministro, S-ro Daladier kaj la ministro por eksterlandaj aferoj, S-ro Bonnet, vizitis la anglajn ministrojn en Londono, por pridiskuti persone gravajn internaciajn interrilatojn.

Ne temos ĉi-tie pri la rezultatoj de tiuj interparoloj : ĉiu intereso povis legi longajn raportojn en la gazetoj. Por pasigi tempon pli ol pro scivolemeco, mi ankaŭ legis tiujn presitaĵojn : mi humile konfesas, ke mi ne tre multe komprenis kaj mi tre rapide perdis la fadenon de la ideoj, ne renkontante, o ve ! ĝentilon Ariane'non por min gvidi permane tra la labirinto...

Sed, dank'al miaj esperantistemaj okulvitroj mi ekrimarkis frazeton, kiu, ŝajnas al mi povas esti utila argumento por la samideanaro. Mi legis efektive, ke, dum interparoladoj, la ministroj devis esti helpataj de dungitaj tradukistoj por sin reciproke interkompreni ! Je tiu legado, miaj haroj de simplanima Esperantisto leviĝis pro teruro ! Jen, mi pensis, jen viroj supoze inteligentaj, kiuj pretendas havi sur siaj ŝultroj la ŝarĝon de intereso de milionoj da homoj, kiuj povas paroli pri tio — en sia propra gepatra lingvo — dum horoj kaj horoj (por pli bone stopi la kranion de la aŭskultantoj) ; jen viroj kiuj vivas vere najbare, ĉar ili povas sin renkonti post nur unuhora aerveturo... Kaj, kiam ili estas unu kontraŭ la alia, post la "koraj" manpremoj, jen ili mutiĝas, ilia parolebleco estas senutila, ili bezonas helpon de aliaj viroj... Mi tute konsentas pri la kapableco de ĉiuj el ili ; mi volas forgesi la italan proverban "Traduttore, traditore" sed mi devas konstati unue ke la estroj perdas la duonon de sia tempo, de tiu tempo, kiu estas tiel multe kosta por ni...

Poste, mi pripensas, mi komparas. Tra la nubetoj de la fumo de mia cigaredo bildetoj plipreciziĝas. Jen nia amiko M. Nogé, la orelo kontraŭ la laŭtparolilo, raveme aŭskultanta la multajn esperantajn dissendojn el diversajn landojn, *ĉion komprenante* ! Jen nia lerta Sekretario organizanto Houzé (ĉu estus necesa lian nomon diri ?), kiu majstre gvidas viziton de la haveno, ĉiujn detalojn klarigante per facil-aŭdebla kaj komprenebla voĉo, por internacia anaro de la somera lernejo ! Jen ankoraŭ la multaj delegitoj kaj grupanoj en Dunkerque, kiuj estas ĉiam pretaj akcepti aliandulojn, paroli kun ili dum horoj pri plej diversaj temoj...

Mi komparas. Unuflanke, ordinaraj homoj, "men in the street", homoj sur la strato, kiuj, per relative malgranda laboro sukcesis forĵeti la lingvajn barilojn, povas libere interŝanĝi ideojn kun siaj similuloj : ali-flanke potenculoj, supoze ĉionsciantaj, tro parolemaj en sia lando, kiuj estas kvazaŭ sen voĉo, kiam ili transiris la limon de la patrujo !

Kompetentuloj certe asertos, ke ne povas esti komuna mezurilo inter la du specoj supremenciitaj, ke helpa, artefarita lingvo ne taŭgus por tiuj gravaj interparoloj... Ni, Esperantistoj, scias bone la kontraŭon, kaj

ni povas bedaŭregi ke niaj gvidantoj ne dediĉis kelkajn horojn, malmulte da horoj, por la trastudo de la demando. Al la nekredemuloj ni konigu nur la paroladojn de nia Majstro, D-ro Zamenhof, dum la universalaj kongresoj : se ili estas senpartiecaj, ili devos konfesi ke la alteco de la penso, la beleco de la stilo, la nobleco de la koro estas almenaŭ egalvaloraĵoj, se ne superaj al la plimulto de la sennombraj nuntempaj paroladoj !

Sed mi timas, pro la vaneco de niaj klopodoj : multaj havas okulojn, kiuj ne vidas...

P. BENOIT.

Porpropagandaj sugestioj

La propagando por Esperanto iras laŭ multaj diversaj vojoj : samideanoj el la tuta mondo senĉese trakuras ilin kaj registras iom post iom ŝatindajn rezultatojn. Antaŭ kelkaj monatoj, mi ricevis leteron de pariza samideano, S-ro Naoumof, kiu petis, ĉu ne estus oportune agi laŭ la metodoj de grandaj turismaj asocioj, kies membraro estas ĝenerale tiel multnombra.

Por ke la diskuto estu pli ampleksa, mi opinias utile respondi pere de la gazetaro. Laŭ mi, la aluditaj turismaj asocioj povas uzi varbrimadojn ĉiam samajn, ĉar la celo estas simila por ĉiuj anoj. Tiu simileco ne reale ekzistas por la Esperantistoj, kiuj povas uzi la helpan lingvon diversele. Tie-ĉi aperas, por la ĝenerala propagando, la neceseco de la landaj asocioj. Jen do ideo, kiun mi cerbumis, post ripenso pri la demando de S-ro Naoumof.

Preskaŭ ĉiutage en la gazetaro, ni legas informojn pri ĉiucelaj internaciaj kongresoj. Per iu ajn rimedo, la naciaj organizaĵoj, la S.F.P.E., ekzemple, kolektus la koncernajn sciigojn kaj sendus al la organizantaj komitatoj leteron aŭ cirkuleron, klarigante la avantaĝojn de la uzado de Esperanto por internaciaj kongresoj aŭ kunvenoj.

Se la nacia organizaĵo estas sufiĉe riĉa, ĝi povas aboni je la specialaj agentejoj por la servo de gazetteltranĉaĵoj ; se ne, ĝi devas alvoki la bonvolan helpon de komitatoj aŭ eĉ de ĉiuj anoj.

P. BENOIT.

Utilaj memorigoj

La Redaktoro de *NŝE* rimarkigis ian tagon, ke en la nunaj tempoj, oni tro malofte parolas pri la genia kreinto de nia lingvo, D-ro Zamenhof, kiu tiel grandanime faris valoran donacon al la homaro. Ŝajnas do, ke ne estos sen utileco konigi al la legantoj interesajn detalojn, eltiritaj el "La Revuo", numero de septembro 1908.

Prizamenhofs Grafologio. — L'École de Graphologie (La Skolo de Grafologio) de R. de Salberg, av. de Villiers, Paris, malfermis en unu el siaj ĉiusemajnaj kursoj, kuriozan skribdivenan enketon pri la skribado de nia Majstro, kaj publikigas dek interesajn "laŭskribajn portretojn". Ĉiuj akordiĝas pri la jenaj ĉefpunktoj de karaktero : — Alta inteligenteco, fortegaj analizemeco kaj konjektemeco — pacienca persistema voleco kaj energia obstineco — rimarkinda ricev — kaj konservemeco de la impresoj — speciala supermezura sentemeco. Kelkaj esploringoj prinotas pacigemecon, simplecon kaj mankon da fieregemeco.

Laŭ ses el ili oni devas ankaŭ noti iom da ŝparemeco kaj ordigemeco.

Sed pri la korpstato, la opinioj diferenciĝas. Laŭ unuj, ĝi estas gal-neŭreca ; laŭ aliaj, neŭrsangriĉa. Laŭ tiuj, nia Majstro ĝuas fortikan bon-fartecon; laŭ aliaj, lia sano estas iom ŝancela kaj lia vidsento malfortiĝis.

Rimarkiginte, ke kelkaj el tiuj priskribantoj ne antaŭe konis la eziston de D-ro Zamenhof (ho ve ! ni ne tro miru pri tio !), kaj eĉ ne povis deĉifri la submetitan subskribon kaj tekston, oni devas konfesi, ke tiaj skribesploraĵoj valorigas tiom la strangan sagacecon de l'grafologiistoj, kiom la altegan ecaron de nia amegata Majstro.

MALNOVAJ NOVAĴOJ

La 16 de februaro 1907, en Lille, la ekslernantoj de la "Supra Lernejo de Komercio", en Lille, kunvenis ĉe la restoracio Divoir por monata vespermanĝo. S-ro Emile Rouzé, el Malo-les-Bains, paroladis kun granda sukceso pri la "Historio de diversaj helpaj lingvoj kaj precipe pri Esperanto". Tiam unu membro de la kunveno proponis akceptigi Esperanton, kiel devan lingvon en la Supra Lernejo de Komercio en Lille. Tiu propono estas nun en tre bona vojo.

(*La Revuo*, junio 1907.)



OFICIALA INSTRUADO DE ESPERANTO. — S-ro F. Durieux, direktoro de la "Montesquieu" Lernejo en Lille, sciigas al ni tre gravan fakton. En la kunveno de la direktoroj de la unua kvartalo de Lille, la 9 de oktobro, S-ro Minet, inspektoro de Unuagradaj Lernejoj, anoncis, ke, de nun estos starigita speciala provo pri Esperanto en la ekzamenoj por la eniro en la superaj unuagradaj lernejoj. De nun la instruado de Esperanto en la knaba kaj knabina superaj lernejoj estas oficiale organizita ; kaj, por plifaciligi la pluan organizon, oni donos preferan promocion al instruistoj sciantaj Esperanton. Raporto pri ĉio tio estas *oficiale* de la akademia inspektoro S-ro Prélat al la rektoro S-ro Lyon kaj al la direktoro de l'unua grada instruado ĉe la ministrejo, S-ro Gasquet. Sekve de tiuj decidoj, 1.100 gelernantoj en la urbo Lille nun lernas Esperanton.

(*La Revuo*, decembro 1907.)

CONDÉ (Nord). — Ĝia urba Konsilantaro, en sia kunsido de l'27 aŭgusto konsentis al la grupo monhelpon da 200 frankoj.

(*La Revuo*, decembro 1908.)

CONDÉ (Nord). — En tiu-ĉi urbo okazos, la 11 de l'venonta julio regiona kongreso de Federacio de l'Nordaj Grupoj, ĉe kiu, espereble ĉeestos alilandaj samideanoj.

(*La Revuo*, februaro 1909.)

REGIONA KONGRESO EN CONDÉ (Nord-Francujo). — En tiu-ĉi urbo la Federacio de l'Norda Regiono havos sian ĵaran kunvenon, la 25 de julio. Al ĝi estas invitataj kore ĉiulandaj samideanoj, kaj kredeble venos Belgoj, Angloj, Holandanoj kaj Germanoj. Oni organizas propagandan ekspozicion, al kiu ĉiuj povas tre helpi per alsendo de libroj, broŝuroj, ĵurnaloj, poŝtkartoj gvidlibroj, komercaj reklamiloj, k.c. Jen la programo : 11a : Akcepto de l'kongresanoj. — 11a-12a : En la Kolegio, kunveno de l'Federacia Komitato ; vizitado de l'fortikaĵoj kaj de l'Ekspozicio. — 12a $\frac{1}{2}$: Festeno. — 3a : Senpaga tramveturado al Bonsecours (Belgujo) ;

promenado en la urbo kaj arbaro ; reveno je la 6a. — 6a $\frac{1}{2}$. — 8a $\frac{1}{2}$: Akcepto de muzikistaro kaj koncerto sur la Verda Placo. — 9a : Balo. — Kosto de l'kongresa karto por la tuta tago : 5 fr. (2 Sm). Por ĉiuj sciigoj, sin turni al la Grupa Sekretario, L-to Mannevy, el la 127-a Infanteria Regimento, Condé. (La Revuo, junio 1909.)

Ĉu kompareble ?

En la kroniko pri la venonta 5a Universala Kongreso en Barcelono, en 1909, la fervorega Esperantisto S-ro Carlo Bourlet starigas la projekton por la elspezoj de la vizitantoj : jen la koncerna eltiraĵo el "La Revuo", julio 1909 :

« Mi faris la kalkulojn de la elspezoj por Parizano. Jen ekzemple la tuta elspezo por Pariza Esperantisto neriĉa, kiu volas fari la vojaĝon *plej malkare* :

Kongreso karto	Fr. 10,00
De Parizo al Port-Bou kaj de Cerbère al Parizo, en 3a klaso.	47,85
Port-Bou al Barcelono, Barcelono al Cerbère en 3a klaso ..	9,00
Kosto de l'nutrado dum veturado	7,00
Septaga loĝado kaj nutrado en Barcelono (klaso A)	35,00
Trinkmono al hotela servistaro (10 % de la kalkulo)	4,00
Sidloko en la teatro (Mistero de doloro)	2,00
Diversaj flankaj elspezoj	10,00

Sume

Rezume, Pariza Esperantisto povos fari naŭtagan vojaĝon, pasigi semajnon en Barcelono, ĉeesti la tutan kongreson por ne pli ol 130 frankoj ! Tio estas neverŝajne malkara !

La nuntempaj Esperantistoj, kiuj vizitas la regionajn kongresojn certe elspezas pli ol la supremontrita sumo : ili tamen ne tro envidu siajn antaŭulojn ! En la jaro 1909a, kvinfrankan moneron estis peza kaj valora peco kaj oni ne forlasis ĝin tiel facilanime...



La standardo de la Grupo Zamenhof en Lens.

Adhérents au Congrès de Lens

TROISIÈME LISTE

- | | |
|---|---|
| 153 M. Duchochois (Boulogne). | 194 M. R. Lemaire (Douai). |
| 154 M. A. Lambottin (Quiévrechain). | 195 M ^{lle} S. Frederich (Douai). |
| 155 M. R. Curnelle (Marcq-en-B.). | 196 M. R. Porez (Somain). |
| 156 M ^{lle} C. Morlinghem (Liévin). | 197 M. A. Picot (Arras). |
| 157 M. S. Stuit (Arras). | 198 M ^{lle} C. Ficheseux (Bruay-en-A.) |
| 158 M ^{me} Stuit (Arras). | 199 M ^{lle} M. Marlard (Bruay-en-A.) |
| 159 M. J. Parent (Hautmont). | 200 M ^{lle} A. Nussbaum (Lens). |
| 160 M ^{me} G. Parent (Hautmont). | 201 M ^{lle} F. Nussbaum (Lens). |
| 161 M. M. Buronfosse (P ^{is} -s/Samb ^{re}) | 202 M ^{lle} S. Munz (Lens). |
| 162 M ^{me} Buronfosse » | 203 M ^{lle} M. Zilberstain (Lens). |
| 163 M. C. Broutin » | 204 M ^{lle} E. Thau (Lens). |
| 164 M ^{me} Broutin » | 205 M ^{lle} T. Thau (Lens). |
| 165 M. M. Marquis » | 206 M ^{lle} F. Strasfeld (Lens). |
| 166 M. A. Marquis » | 207 M ^{lle} A. Ehrenreih (Lens). |
| 167 M. R. Lemaire » | 208 M ^{me} Quiret (Lens). |
| 168 M. L. Colmont » | 209 M ^{lle} R. Mauchien (Amiens). |
| 169 M ^{lle} M. Anceaux » | 210 M ^{lle} F. Zilberstain (Lens). |
| 170 » | 211 M. Lethellier (Lens). |
| 171 M. F. Charlet (Hautmont). | 212 M. H. Schneider (Lens). |
| 172 M ^{me} Charlet (Hautmont). | 213 M ^{lle} M. Soën (Béthune). |
| 173 M ^{me} S. Cocquerez (Lille). | 214 M. H. Giroux (Douai). |
| 174 M ^{lle} Cocquerez (Lille). | 215 M ^{me} C. Arnaud (Hénencourt). |
| 175 M. M. Ballenghien (Bachy). | 216 M. R. Roussel (Longueau). |
| 176 M ^{lle} S. Fermon (Coudekerque). | 217 M ^{lle} M. Eisner (Lens). |
| 177 M. F. Carron (Dunkerque). | 218 M ^{lle} M. Carpentier (Arras). |
| 178 M. J. Nowak (Marles-ls-Mines). | 219 M ^{lle} B. Eisner (Lens). |
| 179 M. R. Favre (Boulogne-s/Mer). | 220 M ^{lle} S. Turpin (Lille). |
| 180 M. D. Cogez (Douai). | 221 M. Léon Tirman (Béthune). |
| 181 M ^{me} Sellier (Abbeville). | 222 M. G. Vatiez (Amiens). |
| 182 M. Nortier (Abbeville). | 223 M. S. Pragano (Bucarest). |
| 183 M ^{me} Nortier (Abbeville). | 224 M. Rampanaux (Jeumont). |
| 184 M. R. Descamps (Amiens). | 225 M ^{me} Rampanaux (Jeumont). |
| 185 M ^{lle} L. Julliard (Amiens). | 226 M ^{lle} Marsal (Jeumont). |
| 186 M ^{lle} J. Colléatte (Amiens). | 227 M. Moreau (Jeumont). |
| 187 M. J. Ghienne (Dunkerque). | 228 M ^{lle} A. Carouge (Arras). |
| 188 M. P. Herbaux (Amiens). | 229 M ^{lle} S. Roussel (Amiens). |
| 189 M. Volqueman (Lille). | 230 M. J. Aldebert (Fresnes). |
| 190 M ^{me} Volqueman (Lille). | 231 M. Frély (Aire-sur-la-Lys). |
| 191 M. A. Wacquet (Waziers). | 232 M. Lemaire (Norrent-Fontes). |
| 192 M ^{lle} G. Longueval (Douai). | 233 M. Darras (Liévin). |
| 193 M. M. Olivier (Sin-le-Noble). | 234 M. Contant (Nevers). |

CONGRÈS DE LENS

GENERALA KUNVENO
DE LA NORDFRANCA ESPERANTISTA FEDERACIO
LA 8-AN DE MAJO 1938 EN LENS

En plenplena festosalonego de Lensa Urbodomo S-ro Humez, prezidanto de la Federacio, malfermas la kunsidon precize je la 10-a. Apud li sidas ĉe la prezidtablo S-roj Degand, prezidanto de Dunkerque-a grupo, S-ro Deligny, honora prezidanto de NEF, Fino Collatte, vic-prezidantino, S-ro Centneršver, ĝenerala sekretario, S-ro Brunet fakeskretario kaj S-ro Guillaume ĉefdelegito de I.E.L. Preskaŭ ĉiuj grupoj de nia Federacio estas riprezentitaj. Krome, ĉestas la kunvenon multaj izoluloj kaj niaj gastoj profesoroj Stuit kaj Pragano kaj Ges-oj Schwartz el Parizo.

I. — En sia malferma paroladeto S-ro Humez salutas la multnombrajn kongresanojn. Ĉar li jam dufoje estis elektita kiel prezidanto de la Federacio, li nepre deziras, ke oni elektu anstataŭanton. En kelkaj vortoj li memorigas la historion de la Federacio dum sia prezidanteco. Kiam li prezidantiĝis, la federacio konsistis el 12 grupoj kun ol 300 membroj ; dum 2 jaroj la nombro de la grupoj kreskis ĝis 30 kaj la membraro ĝis 900, poste malkreskis kaj nun ni havas 22 grupojn kun 664 anoj. Dum la tuta periodo de sia prezidanteco li renkontis multajn malhelpaĵojn. Oni devis lukti kaj nur dank'al energia sinteno de la prezidanto ni sukcesis solvi ĉiujn malfacilaĵojn. S-ro Humez finas sian malferman paroladon esprimante la esperon, ke lia posteulo daŭrigos la malfacilan taskon. Kvankam li ne plu estas prezidanto, li deziras tamen resti aktiva komitatano. La kongresanoj per varma aplaŭdado elmontras sian dankemon al S-ro Humez pro lia senlaca kaj fruktodona laboro kiel prezidanto de la Federacio.

II. — La ĝenerala sekretario presigis sian raporton en la lastan numeron de nia bulteno ; pro manko de tempo li ne legas ĝin, sed aldonas la jenajn sciigojn.

Ni ricevis senkulpigpetajn leterojn de kelkaj federacianoj, kiuj bedaŭrinde ne povis ĉeesti nian Kongreson.

S-ino Georges Azambre el Maroilles perletere sciigas nin ke ŝia edzo, vicprez. de la Esp. grupo de Avesnes estas grave malsana jam de kelkaj monatoj. Li ege bedaŭras ne povi ĉeesti la Kongreson kaj por montri sian simpatian kaj bondeziron, ke la Kongreso plene sukcesu, li sendas 20 fr. al la Kongreskasisto.

La Komitato varme dankas nian samideanon kaj deziras al li rapidan resaniĝon.

F-ino Tondelier, nia radioparolantino ĉe Lillea radiostacio kaj F-ino Barret el Valenciennes, vicprezidantino de NEF, kiu per kortuŝaj vortoj rezignas je sia posteno pro malbona farto.

Krome, la ĝen. sekretario ricevis leteron de F-ino Collatte, nia vicprezidantino, koncerne lian raporton presitan en Nfr-Esp-isto. Ŝi petas eniĝi en ĝin, ke la grupo de Amiens aranĝis nunjare la jenajn manifestaciojn : la 15-1 propagandan feston kun prezento de la filmo "Antaŭen" kaj paroladoj de S-roj Petit kaj Guillaume el Parizo kaj F-inoj Fauchez kaj Kalnine kaj 2 dancofestoj. S-ro Cent plezure korektas tiun forgeson, despli plezure ke la grupo de Amiens estas unu el la plej viglaj kaj okupas laŭ la nombro de la anoj la duan lokon en nia Federacio post Dunkerque-a grupo.

III. — Ĉar la federacia kasisto S-ro Warusfel pro malhelpo ne venis, lian alsenditan raporton laŭtlegas S-ro Houzé.

(vidu apartan raporton de S-ro Warusfel.)

IV. — S-ro Houzé, faksekretario prezentas sian raporton pri la Gazetara Servo de nia federacio. Artikoloj, informoj kaj kronikoj estas regule dissendataj al diversaj franclingvaj gazetoj kaj revuoj aperantaj ne nur sur la tereno de nia federacio sed ankaŭ ekster ĝi. Generale, oni povas konstati, ke tiu servo bone funkcias, ĉar la plimulto de la gazetoj preŝigas regule la alsenditan materialon.

Pro la neĉeesto de S-ro Nogé, federacia sekretario por Radioservo, S-ro Houzé prezentas la raporton pri tiu fako. Bedaŭrinde, ni devas mallaŭdi la radiodelegitojn de la Esp. grupoj kies tasko estas sendi ĉiumonate recenzon pri la aŭditaj radiodissendoj kaj sendi al la radiostacioj dank- kaj gratulkarton. Nur tre malmultaj plenumas tiun taskon. Ankoraŭfoje ni rememorigas al niaj gefederacianoj, ke tiu afero estas tre grava. La radiostacio ne ricevante dankleteron post ĉiu Esp. dissendo opinias ke neniu interesiĝas pri ĝi kaj emas ĉu mallongigi la dissendon, ĉu tute forigi ĝin el siaj programoj. Tio, ekzemple, okazis kun Lillea radiostacio, kiu nur dissendas Esp-on en tute netaŭga tempo.

S-ro Brunet raportas pri sia fako "Izoluloj". Lia agado estas vere laŭdinda. Kun S-ro Stuit li organizis multajn kursojn en diversaj urboj de Arteza distrikto.

Per varmaj kaj longedaŭraj aplaŭdoj la kongresanoj dankas la ambaŭ samideanojn pro ilia fruktodona laboro kronita per plena sukceso.

V. — S-ro Humez proponas kiel kandidaton al la prezidanteco S-ron Degand, prezidanton de la Dunkerque-a Esp. Grupo. Unuanime la kongresanoj akceptas tiun proponon kaj S-ro Degand tuj enoficiĝas, anstataŭtante S-ron Humez kiel prezidanton de la kunveno. Kortuŝita li dankas la ĉeestantojn pro la honoro kiun la federacianoj faris al li elektante lin al tiu respondeca posteno. Li esperas plenumi plejkontentige sian taskon.

Estas elektitaj unuanime :

S-ro Humez, kiel honora prezidanto kaj, por plenumi lian deziron resti aktiva komitatano, la Federacia Kunveno nomas lin delegito por la propagando ;

F-ino Barret kaj S-ro Benoît, kiuj rezignis je siaj postenoj de ge-vicprezidantoj estas elektitaj kiel honoraj ge-vicprezidantoj ;

S-ro Dumarquez el Desvres, federacia sekretario por la Instruistaro — kiel vicprezidanto de la Federacio. Li tamen daŭrigos okupiĝi pri la propagando de Esp-o ĉe la Instruistaro ;

F-ino Colléatte reelektita kiel vicprezidantino.

VI. — Estas decidite akcepti la inviton de la Esp. grupo de Fresnes-sur-Escaut, por aranĝi la Kongreson en tiu urbo. La dato fiksita de la Kongreso : *la 14-a de Majo 1939.*

VII. — Diversaj demandoj :

a) S-ro Rampanaux, prezidanto de la Esp. Grupo de Jeumont proponas en la nomo de sia grupo ke nia Federacio starigu la demandon dum la baldaŭokazonta Nacia Kongreso de la S.F.P.E. en Romans pri la prezento de D-ro Zamenhof kiel kandidaton por la Nobel-premio de la Paco en 1938. S-ro Guillaume promesas apogi tiun demandon.

b) Per vibranta alvoko la Federacia Prezidanto Degand sciiginte la bedaŭran malkreskon de la nombro de federacianoj malkovras ties kaŭzon la nesufiĉecon de interkontakto.

La ĉiudimanĉaj radiodissendoj de Lille P.T.T. estis alte valoraj tiurilate. Sole restas ankoraŭ la bulleno.

En iuj grupoj esperantistaj la nombro de abonantoj estas treege malgranda.

Kiel realigi veran intergrupan kunlaboron sen la ekzisto, inter la grupoj, de ligilo agema kaj regula ?

La sukceso de nia afero dependas precipe de la kunigo de la klopodoj kaj penadoj de ĉiuj per konstanta kaj persista agado.

Cu ni ĝin volas ?

Konsekvence, la Prezidanto prezentas la proponon jenan :

De nun (do por jaro 1939) la abono al la federacia bulteno estos deviga por la aktivaj membroj de ĉiuj grupoj aliĝintaj al la Federacio je la escepto de familianoj al membro abonanto kaj de gejunuloj malpli aĝaj je 18 jaroj.

La neceso de la bulteno pruvita, kion decidi ?

La ĉeestantaro aklamas Nordfrancan Esperantiston kaj ties direktoron. Pri tiu temo M^o Degand substrekas ke S-ro Vernay ne nur oferas sian tempon kaj penadon sed plie por la jaro 1937 deficiton de pluraj centoj de frankoj.

Du kritikoj estis afable prezentitaj.

Unue S-ro Dubois timas malkreskon de la anaro de kelkaj grupoj pro la plialtigo de la kotizo se ĉi tiu devige entenos la abonon.

S-ro Houzé, sekretario de la Grupo en Dunkerque, klarigas ke en tiu grupo la abono estas deviga jam de 5 jaroj kaj ke tio ne malhelpis la grupon iĝi la plej ampleksa de la Federacio (173 aktivaj membroj). Tute male, la sperto pruvis ke sen la bulteno, la grupanaro multe malkreskus.

La grupa kotizo kun abono povas ne superi 20 frankojn poĵare. Tiuj, kiuj ne plu ĉeestas la kunvenojn havas kiel solan kontakton kun esperanto la bultenon. Ili pli ŝatas daŭre pagi 20 fk kaj ion ricevi ol pagi 10 fk ricevante kompence nenion ajn.

Laŭ la dua kritiko prezentita de S-ro Joye la kotizo kun abono ŝajnos eble tro peza al la laboristoj.

S-ro Houzé klarigas ke en la grupo Dunkerque estas multaj laboristoj kaj eĉ senlaboruloj partaj, sed ke neniam iu ajn malfacilaĵo prezentigis el tio.

Elspezo de nur 20 fk korespondante je aliĝo al la grupo, la Federacio, la tutlanda societo kaj la Internacia Ligo kaj samtempe je abono al la bulteno por tuta jaro, tiu elspezo estas vere tre malgranda.

Ĝi povus se necese esti pagata, laŭ du partoj, la duan parton unu monaton post la unuan. En eksterordinaraj okazoj ni ne hezitus pagi por niaj senlaborulaj samideanoj kiuj estus en la nepra neebleco ĝin pagi.

La prezidanto Degand substrekas ke efektive tio estus okazo por montri la spiriton de solidareco kiu devas animi tiujn kun la vera esperantista spirito.

Fine, S-ro Pragano el Rumanujo, kun la permeso de la kongreso, sciigas, neniel dezirante influu la decidon, ke la Esperantistaj Ligoj brita kaj nederlanda kiuj estas inter la plej agemaj, aplikas la devigan abonadon al sia bulteno.

Fine la propono estis adoptita unuanime krom 6 voĉoj.

Jen, por la novaj esperantistoj, la traduko en franca lingvo de la diskutado rilata al la gazeto :

Dans une vibrante allocution, le Président de la Fédération Degand après avoir exposé la regrettable diminution de l'effectif de la Fédération dénonce la cause qui est l'insuffisance de liaison.

Les émissions dominicales de Radio-Lille étaient précieuses à cet égard, seul nous reste le Bulletin.

Dans certains groupes, le nombre d'abonnés est insignifiant. Comment peut-on réaliser de véritables collaborations intergroupes sans qu'il existe entre eux un lien actif et régulier ?

Or notre cause dépend essentiellement d'une mise en commun des efforts de tous pour une action constante et persévérante. La voulons-nous ?

Deux objections très courtoises furent formulées.

La première fut présentée par M. Dubois. Celui-ci redoute de voir l'effectif de certains groupes diminuer par suite de l'augmentation de la cotisation si celle-ci comprend l'abonnement au Bulletin.

M. Houzé expose qu'à Dunkerque l'abonnement est obligatoire depuis 5 ans et que cela n'a pas empêché ce Groupe d'être de beaucoup le plus nombreux de la Fédération. Au contraire, l'expérience a prouvé que sans un Bulletin régulier l'effectif eut considérablement diminué.

La cotisation de Groupe, Bulletin compris, ne doit pas dépasser 20 frs par an. Ceux qui n'assistent plus aux réunions n'ont plus guère contact avec l'Esperanto que par le Bulletin. Ils aiment mieux continuer de payer 20 francs et recevoir quelque chose que de payer 10 francs sans rien recevoir en contrepartie.

La seconde objection fut présentée par M. Joye qui exposa que la cotisation avec abonnement semblerait peut-être trop lourde pour certains.

M. Houzé répond que le groupe de Dunkerque comporte un grand nombre d'ouvriers, même des chômeurs partiels et qu'il n'a jamais rencontré de difficultés spéciales à ce sujet.

Une dépense de 20 francs au plus comportant à la fois adhésion au groupe, affiliation fédérale, nationale et internationale et l'abonnement au Bulletin pour toute une année est en réalité extrêmement réduite.

Elle pourrait au besoin être payée en deux fois à un mois d'intervalle et dans les cas extrêmes nous n'hésiterions pas à la payer pour nos samideanoj chômeurs qui se trouveraient dans l'impossibilité absolue de la verser.

Le Président Degand souligne qu'en effet ce serait là une occasion de montrer l'esprit de solidarité qui doit animer ceux qui ont le "véritable esprit espérantiste".

Enfin, Pragano, roumain, après autorisation du Congrès, signale à titre documentaire que les ligues espérantistes britannique et néerlandaise qui comptent parmi les plus actives comprennent l'abonnement obligatoire au Bulletin.

La nécessité du Bulletin étant démontrée, que décider ? L'assistance acclame *NjE* et son directeur. A ce sujet, M^e Degand signale qu'outre le sacrifice de peine et de temps, M. Vernay supporte rien que pour l'année 1937 un déficit de plusieurs centaines de francs.

En conséquence il présente le vœu que dorénavant l'abonnement à un bulletin fédéral soit obligatoire pour les membres actifs de tous les groupes affiliés à la Fédération, exception faite seulement pour les personnes de la même famille et les membres de moins de 18 ans.

Le vœu mis aux voix est adopté à l'unanimité moins 6 voix.

Rapport du Trésorier sur les mouvements de la trésorerie pendant l'exercice 1937 et la situation financière arrêtée au 24 Avril 1938

Notre bilan financier au 31 décembre 1936 s'établissait de la façon suivante :

ACTIF :	
En caisse	440,35
Au compte chèques-postaux	1.649,40
Divers débiteurs	55,00
Total de l'actif	2.144,75

PASSIF :

Cotisations dues à S.F.P.E. et I.E.L.	640,00
Divers créanciers	600,00
	<hr/>
Total du passif	1.240,00

Avoir fédéral au 31 décembre 1936 904,75

Cet avoir comprenant une somme de 85 frs encaissée en décembre à titre de cotisations 1937 c'est à 819,75 que doit être ramenée la véritable situation à cette époque ci 819,75

Le montant des cotisations versées pour l'exercice qui nous occupe s'élève à 775,00
pour 733 membres affiliés ou isolés.

A cette recette s'ajoutent celles suivantes :

Vente de cartes de membres approuvateurs par notre Secrétaire Général	83,00
Vente de livres de la Centra Librejo à la Foire de Lille	1.202,00
Remise sur ventes diverses effectuées par S-ro Stuit à cette même occasion	29,50
Remise sur ventes effectuées par notre Secrétaire Général	3,90
Cotisations 1938 encaissées fin 1937	147,00

Total des recettes 2.240,40

Nos dépenses se décomposent comme suit :

Frais de trésorerie	50,30
» du Secrétaire Général	128,35
» de S-ro Alglave 1936 et 1937	100,00
» de S-ro Nogé	27,75
Achat d'une gerbe de fleurs	20,00
Location du Stand de la Foire de Lille	652,00
Achat de livres pour ledit stand pertes et frais de vente	974,50
Subvention à Norda Gazeto	300,00
Prix du Fervorigilo (partie)	15,00
Souscription pour l'achat d'un appareil de cinéma	50,00

Total des dépenses 2.398,10

Avoir fédéral au 31 décembre 1937 662,05

Ce résultat est conforme au bilan ci-après :

ACTIF :

En caisse	186,05
Au compte chèques-postaux	1.616,45
Débiteurs divers	50,00

Total de l'actif 1.852,50

PASSIF :

Cotisations dues à I.E.L. et S.F.P.E.	1.170,00
Créanciers divers	20,45

Total du passif 1.190,45

Excédent du passif 662,05

Dans cet avoir 50 francs sont représentés par un dépôt de librairie confié à notre Secrétaire Général.

Etant donné que le pécule de notre fédération était de 904,75 au 31 décembre 1936, il est de notre devoir de souligner une diminution de 242,70 par rapport à notre précédente situation.

Disons tout de suite que cette situation s'est quelque peu rétablie depuis.

Au 24 avril nous avons perçu :

à titre de cotisations	666,00
à titre de subvention du département pour 1937 ..	99,70
à titre de subvention du groupe de Jeumont	100,00
Ventes de cartes par notre Secrétaire Général	45,00

Total	910,70
-------------	--------

Alors que nos dépenses se sont élevées pendant ces quatre premiers mois de l'exercice à	646,70
y compris la subvention votée en faveur de Norda Gazeto, soit	300,00
et celle accordée à S-ro Deligny pour l'organisation de la bibliothèque esperantiste, soit	100,00

L'excédent de recettes de	264,00
---------------------------------	--------

sur nos dépenses porte donc notre avoir fédéral au 24 avril 1938 à :

662,05
264,00
926,05

Souhaitons que de nouvelles adhésions viennent encore grossir ce pécule et nous permettent de constituer un fonds de sécurité qu'il serait bon de ne pas voir descendre en dessous de 1.000 francs.

Jusqu'à nous devons continuer à nous montrer très prudents.

Le Trésorier,
Ch. WARUSFEL.

Raporto pri la fako de la geinstruistoj

(Generala Kunveno en Lens — 8 majo 1938,

Faksekreario : A. DUMARQUEZ, *Lernejestro, Desvres.*)

De ĉiam la konstantaj klopodoj de la Esperantistaro celis : « Enkonduki Esperanton en la lernejojn ». Tiun fortan deziron esprimis la grava Konferenco : Esperanto en la moderna vivo, kiu okazis en Parizo lasjare.

En la fina rezolucio, la Konferenco :

« petas la Registarojn :

— Enkonduki *devige* la lernadon de Esperanto en la lernejojn por la lernantoj 12-14 jaraj, lernadon kiu estus lasta paŝo en la unuagrada instruado (plibonigo de la instruado de la gepatra lingvo kaj ebligado de interkompreniĝo kun la aliaj popoloj).

Kaj unua paŝo por la duagrada instruado (preparo al la lernado de la fremdaj lingvoj).

Por helpi al la efektiviĝo de tiu idealo, komence de oktobro mi sendis al ĉiuj gekolegoj, kiuj estas anoj de la Norda Federacio cirkuleron en kiu mi instigis ilin elpeti de ilia Inspektoro la permeson instrui Esperanton kiel nedeviga instruado en la lernejoj. Plue mi petis raportojn pri la agado kaj la rezultatoj akirotaj.

Bedaŭrinde mi ne ricevis multajn raportojn. Tamen mi povas doni al vi kelkajn detalojn :

1° — Kelkaj instruistoj petis la permeson kaj ne akiris ĝin. La kaŭzo estas ke la Inspektoro aŭ la direktoro ne estas favora al nia movado, aŭ timas preni sur sin la prirespondecon.

Raportis en tia maniero :

S-ino Ansart, en Ecquedecques ;

S-ro Dubois, en Lens.

2° — Aliaj ĝeinstruistoj petis la permeson instrui dum la « libervolaj laborhoroj » kaj akiris ĝin. Mi povas citi :

S-ino Baheux, en St-Martin-les-Boulogne ;

S-ro Bouvis, en Crémarest.

La Inspektoro, kiu permesis estas S-ro Huin, de la distrikto de Boulogne, kiu estas favora al nia movado.

3° — Mi mem petis la permeson instrui esperanton dum la normalaj horoj kiel vivanta lingvo en mia kompletiga kurso, kaj akiris ĝin. Do en mia lernejo okazis du regulaj kursoj, similaj al la anglaj kursoj. Tiuj kursoj, unu elementa kaj unu perfektiga, bone sukcesis. 23 lernantoj sukcesis pri la Atesto pri lernado.

En la departemento Somme, la Akademia Inspektoro permesis la enkondukon de Esperanto en la lernejojn dum la « libervolaj laborhoroj ». Tiu paŝo estas grava, sed mi ne ricevis raportojn kaj ne scias ĉu multaj instruistoj faris uzon el tiu permeso.

Fine alia grava fakto estas notinda. S-ro Couteaux sciigis ĝin al ni en la lasta numero de Franca Esperantisto :

La franca ministro de la nacia edukado konsentas pri la instruo de esperanto en la duagradaj lernejoj, dum la gvidataj libertempo (loisirs dirigés).

Oni povas esperi, ke baldaŭ tiu permeso estos ankoraŭ konsentita al la unuagradaj lernejoj.

Konkludo. — Se oni ne povas diri, ke nia idealo enkonduki esperanton en la lernejojn tute efektiviĝis, tamen oni povas konstati ke iom post iom la afero progresas.

De niaj klopodoj dependas la rezultato, kaj tio montras al ni la devon : propagandi, kaj varbi novajn adeptojn, precipe inter la instruistoj.

Fédération Espérantiste du Nord

après l'Assemblée générale du 8 Mai 1938

Présidents d'honneur : F. DURIEUX ✠, J. VANVERTS, E. DELIGNY, Albéric HUMEZ ;

Vice-présidents d'honneur : M^{lle} F. BARRET, P. BENOIT ;

Président : G. DEGAND ;

Vice-présidents : M^{lle} A. COLLEATTE, A. DUMARQUEZ ;

Secrétaire général : J. CENTNERSWER ;

Secrétaires pour :

a) *radio* : Maurice NOGÉ ; b) *presse* : Ed. HOUZÉ ; c) *instituteurs* : A. DUMARQUEZ ; d) *bibliothèque* : J. CENTNERSWER ; e) *exposition* : M. VOLQUÉMAN ; f) *isolés* : P. BRUNET ;

Trésorier : Ch. WARUSFEL.

Chèques-postaux : Fédération Espérantiste du Nord - Lille 517-15.

Résultats du Concours « Fervorigilo » 1938

Le groupe d'Arras gagne la coupe (pour la première fois)

Classement individuel :

1^{er} Prix (25 frs de livres) : M^{lle} Gladys Kershaw, du groupe d'Amiens.

2^{m^e} Prix (15 frs de livres) : M. Léon Rogez, du groupe d'Arras.

3^{m^e} Prix (10 frs de livres) : M^{m^e} Charmette, du groupe d'Arras.

Les épreuves ont été corrigées par M. E. Deligny, président d'honneur de la Fédération, membre du "Lingva Komitato".

Remarques du correcteur :

1^o — Pour la coupe, le groupe d'Arras (M^{m^e} Charmette, MM. Rogez et Young) l'emporte nettement sur les autres (104 points contre 95 au groupe suivant) ;

2^o — Pour les prix individuels, l'écart est infime entre le travail de M^{lle} Kershaw et celui de M. Rogez.

Les gagnants des prix individuels achèteront eux-mêmes les livres d'*Esperanto* à leur convenance ; ils n'auront qu'à en adresser la facture acquittée au trésorier fédéral (M. Ch. Warusfel, 128, rue de Paris à Douai (Nord) pour en être remboursés, à concurrence du montant des prix gagnés.

Le Comité de la Fédération du Nord adresse ses vives félicitations au groupe d'Arras, ainsi qu'aux autres lauréats du concours.

La coupe sera disputée à nouveau lors du Congrès fédéral du 14 mai 1939, à Fresnes-sur-Escaut.

A. H.



S-ro Raymond SCHWARTZ

Princo de la esperantaj bonhumoruloj.

En Dunkerque kaj en Lens li montris al ni siajn... talentojn !

(Desejno de R. Laval, Kliŝo de Verda Nazo.)

DISTRAĴOJ

Nia konkurso pri la karikaturitaj samideanoj :

La radio-parolanto estas S-ro René Curnelle, kiu parolas en Radio-P.T.T. Nord.

La apostola viro estas S-ro Houzé, sekretario de la Grupo en Dunkerque.

La karikaturoj estas verko de nia rumana samideano Hem. Verda Nazo faris la kliŝojn.

Nur unu bonan solvo ni ricevis de sinjoro Dewaele, instruisto en Gravelines, al kiu ni sendas la premion.

Une lettre du Ministre de la Marine au sujet des cours d'Esperanto

Ministère de la Marine.

REPUBLIQUE FRANÇAISE

Direction du Personnel
Militaire de la Flotte.

Bureau
des Equipages de la Flotte

Etat-Major de la Flotte.

N° 1851.

2/P. M. 2.

Paris, le 7 avril 1938.

Le Ministre de la Marine,

à Monsieur Pierre Delaire, à Orléans.

Monsieur,

Comme suite à votre lettre du 10 janvier 1938, j'ai l'honneur de vous adresser, ci-joint, copie de la circulaire qui précise les conditions dans lesquelles j'autorise les officiers, officiers-mariniers, quartiers-mâîtres et marins à assister aux "Cours d'Esperanto" que vous pourriez organiser dans les ports.

Recevez, etc...

Pour le Ministre et par son ordre :

Le Vice-Amiral DUPLAT,

Directeur du Personnel Militaire de la flotte,

Signé : DUPLAT.

Ci-dessous, nos lecteurs trouveront le texte de ladite circulaire.

Ministère de la Marine.

Paris, le 7 avril 1938.

Direction du Personnel
Militaire de la Flotte.

Bureau
des Equipages de la Flotte

Section Etudes

Etat-Major de la Flotte.

N° 1852.

2/P. M. 2.

CIRCULAIRE

OBJET. — Cours d'Esperanto.

Les officiers, officiers-mariniers, quartiers-mâîtres et marins sont autorisés à suivre "les cours d'Esperanto" qui pourront être organisés dans les ports (en dehors des bâtiments ou services de la marine) par M. Pierre Delaire.

Ces cours seront facultatifs et gratuits. Aucune permission de faveur ne sera donnée au personnel volontaire pour assister à ces cours.

Dès cours par correspondance sont également autorisés.

Pour le Ministre et par son ordre :

Le Vice-Amiral DUPLAT,

Directeur du Personnel Militaire de la flotte,

Signé : DUPLAT.

Destinataires. — Quatre régions : Lorient, Rochefort, 2 escadres, div. d'inst. Moniteur flotte.

Angulo de la leganto

POR PLIPERFEKTIGI

Ekde la unua de januaro, mi, ĉiutage, skribas unu aŭ du esperantajn paĝojn, pri tio, kion mi faras, laboras, pensas, legas, vidas, aŭdas dum la tago. Do, la temoj estas tre diversaj, kaj iom post iom mi uzas ĉiujn vortojn, esprimojn pri la ordinara vivo.

Estas tre interesa kaj utila rimedo por la esperanta praktikado. Ofte, oni ŝatus skribi ion, sed oni demandas : kion mi diros, kio estas inda ? Ĉi tie, ne estas necese traserĉi ; la temoj propramove, prezentigas al vi. (Tio ĉi estas unu el tiuj taskoj).

Cetere plej grava estas ne la aludita afero, sed la maniero rakonti ĝin. Komprenoble, post la verkado, mi, laŭtvoĉe legas ; eĉ dum la tago, mi ankoraŭ, memore, rediras tion, kion mi skribis.

Ĉiuj ni scias, ke unu el la plej bonaj manieroj akiri facilan uzadon de Esperanto estas per interparolado ; sed kiam oni estas izolulo, kiel mi, tio ne estas ebla. Per la rimedo kiun mi indikas mi serĉas la precizecon kiun necesigas la skribata lingvo kaj la rapidecon de la elparolo.

Plie, estas por si mem, memorlibreto, kiun, iafoje, plezure oni povas relegi.

H. DESMAREST à *Huby-Saint-Leu*.

Konstanta subteno

4a Listo.

Ni tutkore dankas al la ĉi subaj gesamdeanoj kaj al la grupoj kiuj, per malavara monsubteno al *N/E*, montris sian deziron ke nia bubeta revuo vivu kaj kresku. Dankon al ĉiuj.

S-ro Duchochois en Tilloy-Floriville	10,00
Esperanto-Grupo en Jeumont-Marpent	10,00
S-ro Rampanaux en Jeumont	10,00
F-ino Marsal en Jeumont	10,00
Esperanto-Grupo en Fresnes-sur-Escaut	50,00
F-ino H. Presté en Domont	15,00
Monkolekto en Lens	86,00
Konkurso Stuit-Pragano en Lens	16,70
La Dunkerque-anoj ĉe la bankedo (punniono) ..	11,05

219,25

Dramo en la dezerto

Vera rakonto

Dum unu monato ni pene marŝadis antaŭen. Dum tiu tempo, nia kolono trairis grandan parton de la Mezopotamia dezerto kaj ni estis nun ĵus apud la turka landlimo, en la regiono alnomata Haut-Djezireh (Alta Djezire) aŭ populare "Bec de Canard" (anasbeko). Nur kelkaj francaj volontuloj estis inter tiuj homoj, duon-soldatoj duon-banditoj, por ilin envicigi en la t.n. "Siria Legiono".

Vesperiĝis. Dolĉa kaj senbrua momento : la malvarmeco de la nokto en la dezerto ankoraŭ ne anstataŭis la teruran varmon de l'tago. Super-vestita de mia "cheich-o" kaj de mia "gandura-o", sidanta laŭ araba

maniero sur la ankoraŭ varma sablo, revema kaj pensema, mi plene ĝuis la magian ĉarmon de tiu nigre-blua nokto.

La mirinde plenstela ĉielo ŝajnis pli poezia ankoraŭ.

Norde, malproksime, la horizonto estis kvazaŭ barita de malluma montara amaso : la kruta Djebel Tur (Ĝbel Tur) sur kies supro, oni ekvidis kvazaŭ en aglo-nesto la turkan urbon Mardin.

Illuminita per brilaj lumetoj ĝi aspektis al mi kvazaŭ grandega lumturo, kiu depost jarcentoj estus gvidinta la karavanojn tra la dezerto komencanta je siaj piedoj. La multegaj lumetoj, tremantaj en la nokto, estis por mia spirito la kaŭzo de ĝis nun nekonataj kaj nepriskribeblaj sensacioj. Preskaŭ izolita meze de tiu sablo-vastego, kiu ĉirkaŭis min, malproksime de la estuloj karaj al mi, for el la socio kaj el la medio kie mi vivis, vidante antaŭ mi, en la malproksimo la spektaklon de ia pro lumoj brileganta domaro, mi havis la impreson esti malfeliĉa ermito, kliniganta je la fenestro de la Soleco kaj ĵetanta ekstazajn rigardojn al tiu urbo kie ĉio ŝajnis esti bruo, movo kaj amuzo.

Mano tuŝetante mian ŝultron interrompis mian meditadojn kaj en la nokto mi rekonis la silueton de mia armenia amiko Jusef (Josefo), unu el la bonaj kamaradoj, kiuj partoprenis mian aventuran soldatan vivon. La lunlumo heligis lian senkoloran kaj malgrasan vizaĝon.

— Kion vi havas, Jusef ? Vi estas pensema, hodiaŭ vespere ?

Kaj brakmontrante al Mardin, al ĝiaj brilaj lumoj kiuj altiris miajn rigardojn kaj vibradigis mian animon mi diris al li :

— Kiom multe la vivo devas esti ĉarmoplena kaj tute dolĉa en tiu turka urbo !

Malrapide li levis la kapon kaj rigardis la lokon kiun montris al li mia etendita brako. Ega ensopiro ŝvelis lian bruston. Mi komprenis tiam ke, subite, granda malgajeco penetris lin. Maltrankviligita pro tiu rapida ŝanĝo en lia sintenado mi observis lin. Tiam, mi vidis du larmojn elflui el liaj okuloj, ruliĝi sur liaj vangoj kaj fali, ankoraŭ varmaj, sur mian manon. Mi silentis. Mi respektis tiun viran doloron, certe grandegan kiu lin trafis neatendite kaj kiu, kvazaŭ fulmo, trairis subite la nokton de lia pasinteco...

Kiom estas da samalfeliĉuloj, kiuj malgaje vagadas sur la tero, kvazaŭ kontuzitaj, vunditaj kaj disrompigitaj de ĉiuspecaj ĉagrenoj ! Tamen ili iras, ili marŝas sur la malglata vojo de la vivo, penante meti sur sian vizaĝon trankvilan, indiferentan maskon, kiu kaŝos al la amaso, kvazaŭ ĝi estus hontinda vundo, la terurajn moralajn turmentojn kiujn ili suferas !

Tie, sur lando, kie li suferis, la Armeniano estis unu el tiuj malfeliĉuloj.

Nun, denove staranta, la korpo rigida, la rigardo kvazaŭ serĉante nevideblajn malamikojn, la mano etendita kun tragedia soleno al la turka urbo, li ekkriis :

— Tiu urbo, lumigata de mil fajretoj, kiun vi admiras, mi ĝin ekvidas kiel monstran fantomon starantan sur la supro de la montaro, kiu konas la sekretojn de la malfeliĉo de mia pasinteco. Tiu lumo kiu ravas vin, amiko mia, estas, laŭ mi, ruĝe kolorigita, per la sango de homoj karaj al mia koro. Inter la muroj de tiu ĉi urbo mi perdis tion, kio estis mia plej valora surtera havaĵo : mia patrino, mia fratino... Jes, vi admiras, eĉ amas tiun urbon kiu incitas vian poezion sentemecon, sed mi ĝin malamegas per ĉiuj miaj fortoj ĉar ĝi estis kaj restas, la terura atestloko de mia malfeliĉo. La okuloj plenaj de senutilaj larmoj, mi vidis, mortfaligitaj, parencojn kaj amikojn, senkompate frapitaj, vunditaj, mortigitaj per sangruĝigitaj ponardoj. Mi vidis mian fratineton, naivega kaj senkulpa ankoraŭ, forprenitan kaj trenitan en la koto de la ebria, bruta soldataĉaro kaj, antaŭ la okuloj mem de mia duonfreneziganta patrino, elporti la honton... »

La korpo skuita de singulto, kaŝante la vizagon en siaj manoj, plorante kvazaŭ eta infano, li sidiĝis sur la sablo... Mi restis silenta, por kaŝi al li la emocion, kiu premis mian koron. Li komprenis ke mi sekrete kompatas pri lia ĉagreno. Tiam li rakontis al mi sian tutan vivon kaj kiel, iam, li vivis feliĉa en iu kvieta regiono de Armenio, en dolĉa varmigo de familia hejmo. Li sciis rekrei por mi kaj montri al mi, sonĝe, la kamparan dometon, puran kaj ĉirkaŭitan de floroj kaj arbetoj, la vojeton sur kiu, plurfoje ĉiutage, li marŝis kun sia libro sur la dorso, por iri sin instrui dum kelkaj horoj en la proksima lernejo ; siajn jumajn kamaradojn de klaso kaj de ludo...

Li sciis ankaŭ, parole pripentri al mi la ruĝan fantomon de la Milito kiu, kiel vivega kaj furioza uragano, ruinigis tiun malfeliĉan regionon de Armenio, kiel ĝi jam estis ruiniganta la plej civilizitajn centrojn aŭ la plej malproksimajn angulojn, alportante kun ĝi, laŭ abomena sulko, la Ruinegon, la Nutromankon kaj la Morton.

Dante-inda premsonĝo, sen iu ajn ekzemplo en la historio de la homaro, kaj kiun la homoj mem, volonte kaj sen iu ajn kontraŭstaro, faliĝis sur ilin ! Moloho revivigata, vomante sur la mondon per la sennombraj buŝoj de siaj kanonoj fajron kaj ŝtalon ; senlace sin nutrante, satigante per abomena kaj naŭza kaĉo de homa karno. La mondanoj, ope trafitaj de frenezo, mortigante unu la alian, serĉante inter la lastaj lumetoj de sia droninganta menso, manieron, arton pli efikan por homo eligi el la lukto alian homon...

Tiu angulo de Armenio estis tute neniiĝita de la modernaj Barbaroj. La juna armeniano vidis tiun popolamason, besta en siaj instinktoj, ankoraŭ fumanta pro la sango kiun ĝi verŝis, daŭrigi sian senutilan barbarecon : la mortigistoj perforte eniri lian domon, kun la sangruĝa spado aŭ la ponardo de la krimo en mano. Li vidis buĉi sian maljunan patron, kiu malgraŭ la granda nombro de la banditoj, batalis brave por protekti sian familion ; ankaŭ fali siajn fratojn pro la batoj, la kruelego kaj la furiozo de la senkompatemuloj...

Lia patrino, konsternigita, freneziginta pro doloro, kun okuloj sekaj ĉar la larmoj glaciigis en ŝia koro, forkuris senespere, premante en siaj tremantaj brakoj sian plej junan infanon dum ŝia filino rapide sekvis ŝin amarplorante...

La malfeliĉa virino renkontis aliajn patrinaĵojn, aliajn edzinojn, jam foririntaj, kiuj ankaŭ sukcesis eviti la teruran amasbuĉadon. Dolorema, malserena kunularo ! Ili marŝadis, senkonsciaj, lamentaj, al nekonscianta sorto ? Ili trairis ebenaĵojn, supren-malsupreniris montarojn, dormis sur la varmega sablo de la dezerto. Multaj ne plu vekigis kaj jen estis por ili la fino de la terura kalvario ; por la aliaj suferoj, malsatego, malsano, malvarmo, febro, frenezo...

Cifone vestitaj, skeletaj, malsategaj, iliaj nudaj piedoj lasante sur la ŝtonetoj de la vojo sangan postsignon de sia trajto, tiamaniere dum longtempo, tagoj post tagoj, ili efektivigis tiun kompatindegan migradon ĝis kiam la ankoraŭ vivantaj alvenis ĉe la pordojn de Mardin ; tiu urbo ŝajnis al ili la tabulon de savo tie metitan de la Providenco por ilin liberigi de la danĝero.

Ilo ! ve. Malfeliĉuloj ! Apenaŭ ili alvenis kiam homamaso ankoraŭ pli cinika kaj pli sovaĝa ol tiu, kiun dank'al rapidega foriro ili sukcesis eviti, sinĵetis sur tiun brutaron da vivantaj, marŝantaj kadavroj. Kaj la lastaj restoj de la malgranda popolo armenia, malforta velŝipo sur furiozega maro, venis droni, frakasigi, enasbimiĝi tien...

Jusef estis forrabita de sia patrino kiu, falinta teren, premita de la kruelegaj brutoj, jam agoniis, la okuloj preŝkaŭ vitrecaj, la haroj paste sangluigita kaj kiu malespere al li etendis ankoraŭ la brakojn. Lia fratino, perforte forprenita de iu tigro-vizaĝa kurdo kun satirusaj

gestoj... Du teruritaĵ krioj eliĝis el lia streĉita gorĝo : panjo ! fratineto ! kaj li svenis.

Kion li faris poste ? Li ne plu memoras. Doloro kaj vido de tiuj abomenindaĵoj forprenis iom de lia saĝo. Li scias nur, ke li estis poste vendita kontraŭ argenta monero al fikomercisto de Mardin. Safo pli valoris, en tiu tempo, ol homo... Li vivis dum kelkaj jaroj kiel sklavo ĝis la tago kiam li sukcesis ŝtele elĉenigi kaj forkuri al Alep-o. Tiam okazis lia ligkontrakto al la t.n. "Siria Legiono".

Li finis la rakonton pri sia vivo per nova singulteksplozo. Larmoj malsekigis miajn okulojn. Ĉe tiel granda sufero kaj malfeliĉego la plej malmola koro sin malfermas kaj kompatas. Mi kisis lin, mi konsilis al li rezignacion kaj fortanimecon. Li dankis min per rigardo, kiu mi ne povas forgesi, kaj etdante siajn kripigitajn pugnojn al la montaro, al tiu malluma Dĵebel Tur, kiu kronas Mardin, li ekkriis : « Mia patrino mortis, jes, sed mia fratino, kie vi ŝin kaŝis malbenegita urbo ? »

Kaj mallevante la rigardon for de Mardin, ĉiam brila kiel astro sur ĝia malhela monto, li foris, ŝanceliĝante kvazaŭ ebrulo, al la tolaĵaj "ĝitunoj" kvazaŭ stompitaj de la nokto.

Kaj efektive li estis ebria, ebria pro doloro.

CL. VERNAY.

Vivo de la Grupoj

BOULOGNE-SUR-MER

Le vendredi 29 avril, salle Sainte-Ide, a eu lieu une très intéressante conférence organisée par le Groupe local sur "La Chine Actuelle". Le conférencier était le R.P. Chinois J.-B. Kao bien connu dans les Groupes Espérantistes de notre région auxquels il a si souvent apporté son concours bénévole.

Cette causerie, sur un sujet si brûlant d'actualité, fit mieux apercevoir les côtés mystérieux de ce grand pays et les aspirations de son peuple. Elle contribua d'autre part à convaincre l'auditoire de la haute portée morale de l'Espéranto en même temps qu'elle démontrait la richesse incomparable d'expression de cette langue.

JEUMONT-MARPENT

Le Groupe, qui fait vraiment honneur à notre Fédération par son activité féconde et son entrain remarquable, organise pour le dimanche 26 juin, dans un cadre ravissant, une charmante sortie champêtre à Liessies. Jeux, surprises, concours de pêche et assauts de... bonne humeur sont au programme. Tous nos amis peuvent y participer. Et surtout que l'on se le dise : on ne s'embête pas avec nos amis de Jeumont-Marpent !

LENS

Le Groupe ne songe nullement à s'endormir après les lauriers qu'il a cueillis pendant le très joli Congrès de Lens. En effet, voici les informations qui nous parviennent de ce Groupe :

La Grupo Zamenhof intencas organizi specialan kurson por geinstruistoj. Ĝin gvidos nia amiko Eugène Dubois, instruisto.

La 10-an de julio, la Grupo eskursos al Malo-les-Bains. Por ĉiuj informoj sin turni al S-ro Erjavec.

FUNEBRO. — Kun granda bedaŭro, ni eksciis pri la morto de la patro de niaj amikoj, gesinjoroj Vala, kiuj tiom faris por la sukceso de la

federacia kongreso en Lens. Ni esprimas al ili niajn plen sincerajn kondolencojn.

GAMACHES (Somme)

Grâce à l'infatigable et fructueuse activité de notre pionnier M. Duchochois, de Boulogne-sur-Mer, qui réside maintenant à Gamaches, un Groupe Espérantiste est en formation dans cette localité.

Le groupe a été déclaré à la Sous-Préfecture d'Abbeville et les statuts comportent l'affiliation de tous les membres actifs à la Fédération du Nord. Un Comité de patronage a été formé qui groupe les personnalités suivantes :

M. P. Bacquet, conseiller général, député de Boulogne-sur-Mer, vice-président du Groupe Espérantiste parlementaire ; M. M. Delabie, conseiller général, député de la Somme, maire de Bouvaincourt-sur-Bresle, membre du Groupe Espérantiste parlementaire ; M. A. Baillet, maire de Gamaches ; M. F. Duchard, curé de Gamaches ; Docteur R. Moullier à Gamaches ; M. M. Annebicque, industriel à Gamaches ; M. S. Henocque, maire de Tilloy-Florville, près Gamaches ; Docteur F. Courtmontagne, président des Anciens Combattants ; M. M. Lescur, négociant, président du Comité des Commerçants ; M. R. Evrard, instituteur, Ecole moderne, à Oisemont ; M. R. Beauvallet, pharmacien à Gamaches ; M. E. Chantrel, publiciste, directeur de journaux ; M. M. Le Guennec, propriétaire de l'Hôtel St-Pierre, 2-4, rue de Normandie à Gamaches (siège du Groupe Verda Stelo).

Notons que le propriétaire de l'Hôtel St-Pierre accorde gratuitement une salle pour les réunions du Comité.

Nous sommes heureux de féliciter tout particulièrement M. Duchochois pour la belle activité qu'il ne cesse de montrer en faveur de l'Espéranto et pour avoir su s'entourer d'un Comité de patronage groupant toutes les personnalités de la région. Nous ne doutons pas que le jeune Groupe de Gamaches fera bientôt parler de lui.

CALAIS

L'ESPERANTO A LA BIBLIOTHÈQUE MUNICIPALE. — Le groupe Espérantiste de Calais "Verda Stelo" est heureux de signaler que le Conseil d'administration de la Bibliothèque Municipale a consenti, en raison du développement croissant du mouvement Espérantiste dans le monde, à l'achat de quelques œuvres littéraires, écrites dans la langue du D^r Zamenhof.

Pour augmenter l'intérêt de ce rayon spécial, le Comité de "Verda Stelo" a décidé d'y adjoindre sa propre bibliothèque, comprenant une centaine d'ouvrages intéressants dont plusieurs sont du D^r Zamenhof même.

Ajoutons que l'on pourra également lire à la Bibliothèque, le journal hebdomadaire "Heroldo de Esperanto", organe officiel de la "Ligue Internationale Esperanto" dont le groupe "Verda Stelo" supportera les frais, pour permettre à ses membres et au public de se tenir au courant du mouvement et de se procurer des adresses de correspondants en tous pays.

Le Comité fait appel aux anciens Espérantistes, pour enrichir cette collection, par des dons de livres ou de documents qu'ils auront ainsi toujours à leur disposition, sous la sauvegarde de l'Administration.

S'adresser dans ce but à M. Henri Clause, président, ou à M. G. Perrin, secrétaire de Verda Stelo.

DUNKERQUE

De nove S-ro Pragano venis al Dunkerque. Li faris du tre interesajn prelegojn : la unua en Dunkerque mem, en la urbdomo, pri literaturaj temoj, prelego per kiu li kompletigis tiun de li farita antaŭ kelkaj semajnoj ; la dua en la "Sanatorium" de Zuydcoote pri Rumanujo. En Zuydcoote ĉeestis aŭdantaro de proksimume tri cent personoj. En ambaŭ paroladoj, S-ro Pragano montris rimarkindan kapablecon kaj atingis brilantan sukceson. Ĉiuj ĉeestintoj konservos plej bonan memoron pri lia ŝatata vizito.

Meze aŭ fine de junio estas atendata S-ro Krestanoff, bulgara publicisto, Lingva Komitato, kiu belege prelegos pri Bulgarujo.

La aliaj Grupoj kiuj deziras ricevi lian viziton estas petataj informi la Grupo de Dunkerque. Probable estos neniu elspezo. Absolute senpage li prelegis en Danujo.

La 27an de julio alvenos S-ro Nicolaisen, el Norvegujo ; instruisto, li interese prelegos antaŭ ol foriri al la Universala Kongreso kaj pli poste en Ĉeĥoslovakio.

Ĉar ni antaŭvidas diversajn kunvenojn dum la somero, ĉiuj samideanoj trapasantaj Dunkerque, Malo k.t.p. estas petataj sciigi sian alvenon al "Esperanto-Dunkerque".

En Hôtel "Eole", 16o, Digue de Mer, Malo, estos kredeble esperantistaj loĝantoj dum preskaŭ tuta somero laŭ la ricevitaj leteroj. Ĉtere, dum tuta jaro funkcias la babiladaj kunvenoj en la 1a etaĝo de Kafejo "Au Centre", place Jean-Bart (tél. 664) ĉiusembe de la 19a 15 ĝis la 20a 30. Koran bonvenon. Neniam timu nin ĝeni ! Ĝis la !

EDZIGO. — Ni estas feliĉaj sciigi al niaj legantoj ke okazis en Rosendaël, la 21an de majo, la edziĝo de S-ro Lucien Dejans, kun F-ino Renée Desgardin, ambaŭ fervoraj esperantistoj kaj membroj de la Grupo de Dunkerque.

Ni memorigu ke S-ro Dejans prenis sur sin, jam delonge la pezan ŝarĝon adresadi kaj sendadi *NfE*, laboro ĝoje plenumita de li.

Al nia afabla kunlaboranto, al sia ĉarma edzino kiu de nun helpos lin en lia laboro esperanta, ni direktas niajn plej sincerajn gratulojn kaj bondezirojn por plena feliĉo.

FUNEbro. — Lastminute ni ekscias pri la morto de S-ro J.-F. Geeraert, filo de nia grupano Geeraert (Sipestro), al kiu ni direktas niajn plej sincerajn kondolencojn.

HONORIGO. — Kiel oni scias, estis decidita, okaze de la 29a Universala Kongreso en Varsovio lastan jaron, kaj de la 50-jara jubileo de Esperanto, honorigi per verda steleto kun ora palmbranĉeto, la veteranojn kiuj estas Esperantistoj ekde la jaro 1905-a aŭ antaŭe.

Dum la lasta ĝenerala kunveno de la grupo, ni konstatis kun plezuro ke la Prezidinto-Fondinto, S-ro Benoît fiere elmontras ĉe la butontruo la novan insignon. Sendube, "la jaroj estas la kaŭzo", kiel diris la fablisto : tamen, ni kore gratulas nian unuan gvidanton, kiu, dum multe da jaroj, neniam forlasis la agadon por Esperanto.

Judi 23 Jun de 18 h. 30 à 20 heures. — Restaurant Trassaert.

SOIRÉE GAIE, Concert, Chants, etc...

destinée à faire connaître entre eux les différents membres du Groupe et à pratiquer agréablement les connaissances acquises.

Samedi 2 Juillet à 20 h. 30. — Salle des Fêtes, Hôtel de Ville de Malo.

GRANDE FÊTE FAMILIALE FRANCO-ESPÉRANTISTE

Elle se prépare admirablement, faite la connaître à tous vos parents et amis pour qu'ils soient libres ce soir là.

Dimanche 3 Juillet à 11 heures. — Hôtel de Ville de Rosendaël.

INAUGURATION OFFICIELLE DE LA RUE ZAMENHOF

et Réception par la Municipalité

De nombreux espérantistes français et étrangers viendront spécialement à cette occasion.

Nous devons y assister tous en hommage au créateur de la langue de la Paix et en remerciement aux autorités qui veulent si favorablement reconnaître l'importance de notre action.

DERNIÈRE HEURE. — Au moment de mettre sous presse, nous apprenons que c'est seulement fin juillet que notre samideano bulgare Krestanoff pourra nous rendre visite à Dunkerque.

LILLE

Le chanteur et compositeur de talent qu'est notre samideano hongrois Sarossy est actuellement à Lille où il exerce son art (Taverne Lilloise, 10, rue de Béthune) jusque fin juin. Il viendra ensuite probablement à Dunkerque faire une conférence. Tous nos amis espérantistes de passage à Lille sont cordialement invités à aller l'écouter.

FRESNES-SUR-ESCAUT

La venonta Kongreso Federacia okazos la 14-an de majo 1939 en nia urbo. Jam depost la reveno el Lens kien ni vojaĝis ekskurse 30-ope, ni komencis preparajn laborojn kaj viglan propagandon. Ni esperas, ke multenombraj gefederacianoj partoprenos nian kongreson kaj ni varme petas jam denun sendi la aliĝon al la Kongreso.

Baldaŭ okazos ekzamenoj por la gelernantoj de la ambaŭ kursoj porkomencantoj kaj perfektiga. La perfektigantoj provos la ekzamenon por la Supera Atesto pri Lernado.

Itala samideano S-ro Bianco, frato de la mondfama itala aŭtomobilkurada ĉampiono paroladis antaŭ la grupanoj pri la praktikaj servoj kiujn li akiris dank'al Esp-o akompanante sian fraton tra diversaj landoj.

VALENCIENNES

Plezure ni konstatas ke la grupo reviviĝis. Konversacia kurso okazas ĉiuvendrede je la 20-a kaj duono en Foyer, place d'Armes.

La esperantistaj afiŝoj pri la eŭkaristia Kongreso en Budapest estis metitaj en ĉiujn preĝejojn de la urbo. Apude estis fiksita afiŝo kun sciigoj pri utileco de Esperanto kaj informo pri la kursoj.

Kiel la pasintan jaron Esperantista budo funkcios ĉe la Komerca Foiro, kiu okazos inter la 25 de junio kaj la 5 de julio.

KUIRARTO

Unu el niaj bonaj amikoj kaj simpatia esperantisto kies profesio estas ĉefkuiristo bonvolis akcepti la taskon doni konsilojn kaj receptojn pri la kuirarto al niaj samideanoj (legu : samideaninoj !) pere de *NfE*.

Ĉi foje jen estas la recepto por prepari ŝvelitajn terpomojn (pommes soufflées). Nia amiko estus tre feliĉa ricevi de la personoj kiuj spertos tiun recepton, iliajn rimarkojn aŭ dezirojn pri publikigo de aliaj receptoj.

Direktu leterojn al *NfE* kiu transdonos.

LA RED.

KIAMANIERE ĈIUFOJE SUKCESI LA PREPARADON DE ŜVELITAJ TERPOMOJ

Antaŭ, ĉio mi diru al vi kelkajn vortojn pri la kialoj de ne sukceso :

Vi ne uzu malnovan grason, nek terpomojn pelitajn antaŭ longa tempo, tio estas grava.

La plej taŭgaj terpomoj uzindaj por bone sukcesi tiun recepton estas la t. n. "Hollandaises" kaj oni devas elekti la kiel eble plej dikajn.

La frumaturajn terpomojn oni devas tranĉi pli dikpece ol la terpomojn rikoltitajn je la mezo de oktobro.

Atentu ! La persono, kiu pelas la terpomojn ne devas kapti ilin per la pinto de la tranĉilo kaj pro la sama kaŭzo, oni devas atenti ke la kribri-kulero ne ellasu ferfadendon ĉar la terpomoj devas esti tute sendifektaj.

Por faciligi la tranĉadon oni devas kubigi la terpomojn kaj poste oni tranĉu ilin laŭlonge kiel eble plej regule. La tranĉaĵoj estu du aŭ tri milimetroj dikoj.

Poste, oni zorgu purigu ilin en akvo por eviti ke ili kungluiĝu.

Varmigu frit-oleon aŭ frit-grason, ĉu de porkaĵo, ĉu de bovaĵo. La graso devas esti tiel varma kiel por ordinara kuirado de frititaj terpomoj. Tiam, vi ŝutu, per ambaŭ manoj, la terpom-tranĉaĵojn nur unu post la alia.

Se la terpomoj tuj surnaĝas, estas indiko ke la graso estas tro varmega. Tiukaze, vi ŝovu la fritujojn iom for de la fajro, tamen ne tro malproksime, ĉar la graso devas pograde malvarmiĝadi ĝis kiam la terpomoj ekŝvelas, tiam vi movu iom la fritujojn kaj eltiru el ĝi proksimume kvaronon de la graso, kion vi varmigu en alia pato. Kiam tiu graso ekfumas, vi verŝu ĝin rapide sur la terpomoj, kiuj estas en la granda fritujo.

Se la terpomoj estas bone tranĉitaj regulece, ili ŝvelos senescepte.

Poste, vi eltiru tuj la terpomojn per la kribri-kulero kaj sternu ilin sur plado aŭ telero, sed ne unu super la alia.

De tiu momento vi povas certiĝi pri la sukceso.

Fine, ĵetu ĉiujn tranĉaĵojn en la varmegan fritgrason, movigante la ujon dum dek sekundoj.

Kun plezuro, vi vidos tiam viajn terpomojn ŝvelantaj kiel oraj balonetoj.

Eltiru ilin el la fritujo, ŝutu salon, kaj prezentu ilin al la gastoj kun bonapetiton deziron de

Ch. AUCERNE.

El la Redakcia Sako

A NOS AMIS. — Le présent numéro de *NfE* a été tiré à un plus grand nombre d'exemplaires que d'habitude. Nos amis peuvent, pour nous aider et faire connaître notre revue, nous commander un certain nombre d'exemplaires qu'ils pourraient vendre dans leur groupe. Prix du numéro : 1,50. Ne plus commander après le 30 juin.

De *Lens*, nous parvient l'information que les samideanoj desirant se procurer la photographie du Congrès (23 × 17 cent.) peuvent s'adresser à M. Max, 40, rue de Lille à *Lens*. Prix : 8 frs. Compte Chèques postaux 176.58 Lille.

KORESPONDADO. — 12 danaj gesam. deziras korespondi kun ĉiuj landoj. Respondo garantiata. Skribu al S-ro Herluf Westergaard, Skot'o jsmagasinet, *Borkop* (Danujo).

Komencantoj deziras korespondadi kun samidean. ĉiulandaj. Esperanto-Klubo, Holowhitu School, *Palmerston-North* (Nova-Zelando).

Deziras korespondadi kun gesam. en ĉiuj landoj : Ekaterina Jonĉeva, Ivanka Sedloeva : Kiĉka Mihajlova, Pena Mihova, Elena Janakieva, Ela Angelova, Nisim Kalev, Angel Temelkov. Adreso de ĉiuj : vilaĝo *Sestrino* (Pazardĝik) Bulgarujo.

ĈIRKAŬ LA OFICIALA PROTOKOLO DE LA LENS'A KONGRESO

Refoje la Dunkerque'a grupo estis reprezentita en nia ĉiujara festo. Jam sabate, unua taĉmento okupis la verdan urbon. Kelkaj kuraĝuloj inter niaj grupanoj devis resti seriozaj preskaŭ la tutan posttagmezon, imagu al vi, ili devi trapasi la ekzamenojn, in inter ili eĉ pasis traen ! Ne grave, oni des pli rapidis por dronigi la ĉagrenon de la malsukcesintino en aperituvon, kiel decas. Post agrabla vespermanĝo, oni vizitis la balon, kie ĉiuj senescepte turniĝadis laŭ sia kapablo. Inter du valsoj, nia Verdazulo ĝojigis la ĉeestantojn per rakonto pri iu fama vojaĝo. Nur malfrue ni povis ripozigi niajn kruojn. La morgaŭon, novaj gegrupanoj, ne malpli bruaĵ, alvenis. Okazis la ĝenerala kunsido kaj la oficialaj primovada kaj prifinanca raportoj, dum kies lego kelkaj dormetis saĝe. Tamen ili vekigis pro la varma aplaŭdado salutinta la novan prezidanton de nia federacio. La pli atentaj eĉ aŭdis ke oni elokvente silentis pri la ĉeestado de niaj eksterlandaj amikoj. Pardonebla forgeso, tamen menciinde estas ke almenaŭ 9 landoj estis reprezentitaj, nome : Anglujo, Hungarujo, Polujo, Ĉeĥoslovakujo, Rumanujo, Nederlando, Bulgarujo, Belgujo kaj... Dunkerqu-ujo.

Post la kunsido, ĉiuj retrovis plenan viklecon en la klopodado akiri ĉampanglason tra la amasego premita en la tamen granda salono de la urbdomo.

Post rapida vizito al la foiro, ni ĉiuj retrovigis ĉirkau la festentablo. Kiam ni estis tute sataj kaj malsoifaj, por helpi al bona digestado ni viglege takt-aplaŭdis la oratorojn sub la gvidado de nia grupsekretario, vera taktaplaŭda majstro.

La posttagmezo tro rapide forpasis, tiom agrable ĉarmis nin la lokaj muzikistoj, aktoroj k.t.p. La mirinda talento kaj dinamismo de Raymond Schwartz kaj cdzino aldonis al tiu teatrovespero ne forgeseblajn minutojn.

Jam estis la horo trafi la vagonaron, ni iomete bedaŭris ke tiel rapide forpasis la 19a federacia.

Kaj tamen nia grupo bonege amuziĝis...

La Speciala sendito de N. F. Esp-isto.

Fame konata de multaj Esperantistoj !

GRAND HOTEL d'OOSTDUINKERQUE

OOSTDUINKERQUE - BAINS (Belgujo)

Posedanto : P. BENOIT, malnova esperantisto

Les bonnes adresses de LENS...

Votre Tailleur

M. MAX

Ses collections de tissus *Sa coupe*

Son exécution de travail

16, rue Gambetta - LENS

Téléphone 603

Grand Choix en Soieries
Lainages, Velours, Nouveautés

Michel

11 bis, Boulevard Basly - LENS

*Toute marchandise de 1^{er} choix
à des PRIX DE SOLDES*

AU GANT D'OR

26, Boulevard Basly - LENS

Téléphone 199

MAISON RENOMMÉE POUR

*ses gants de peau, ses gants de tissu
ses robes, ses blouses, ses sous-vêtements
ses bas, ses chaussettes de marque
ses écharpes, ses cravates pour hommes, etc.*

AU MOKA

Pâtisserie - Confiserie

VIALA - MOUTON

Boulev. Basly - LENS

Articles pour Baptêmes et 1^{res} Communions

Parfumerie Defaux

*SEULE MAISON SPÉCIALISÉE
POUR LA VENTE AU POIDS*

21, Boulevard Basly - LENS

Pour s'habiller chic et bien

C'EST

Aux Vêtements Parisiens

36, Boul. Basly - LENS

CONFECTION - MESURE

HOMMES

ENFANTS

A la Côte d'Azur

23, Boulevard Basly, 23 - Lens

Téléphone 647

Fleurs naturelles et artificielles

Gerbes, Corbeilles, Voitures fleuries pour mariages

Croix - Couronnes

Livraison à domicile — Prix modérés

À la Charentaise

Spécialité de Pantoufles Chaussures

20-22, Boulevard Basly - LENS

Hôtel-Pension "EOLE"

Madame PESSEY

158, 159, 160, Digue de Mer
MALO-LES-BAINS (Nord)

Téléphone 13.25

Vue magnifique sur la mer
Réduction 5% aux Espérantistes
Esperanto parolata

Esperanto-Literaturon je originala prezo

Liveras al vi

ESPERANTO
BAUDIMONT-ARRAS

EXPORT

BRAUNIA

Buvez les bonnes Bières
de la Brasserie CARLIER
11, rue Félix-Faure, COUDEKERQUE-BRANCHE

R. C. 808 — Tél. 570 Dunkerque

Elles sont livrées partout et chez tous
en fûts et en bouteilles

BOCK LUXE

BOCK IDEAL

Esperantistes !

Pour tous vos

VOYAGES

adressez-vous à la

C. E. F. A.

33, rue Victor-Hugo
BOULOGNE-SUR-MER

Conditions spéciales pour l'Angleterre

ESPERANTO - ĈAMPANO

Grand 1^{er} cru — Unua Vinberregiono

Klasigita en 100 % kategorio

Laŭ gustoj : Dolĉa ; Duondolĉa ; Maldolĉa

Prezoj en Reims :

Carte verte (verda kapuĉo) po botelo, 12. fr. flk

Mendu al samideano

R. CHANCE, 3, rue René-Bourgeois, REIMS (Francujo)

Pago al R. Chance, Mailly-Champagne (Marne)

Poŝtĉek-konto : Nancy 334-72



A L'IMPECCABLE

VÊTEMENTS

5, Place Jean-Bart - DUNKERQUE

...l'ami des Espérantistes

PEINTURE

Travaux rapides et soignés

PAPIERS PEINTS

LE PETIT & FILS

6, Place du Palais-de-Justice
BOULOGNE-SUR-MER

Oni parolas kaj korespondas Esperante

EKZEMO

Interna kaj novaj KURACADO per la pilolo
« d'ANTECZEMA ». Resanigoj mirindaj eĉ malfacile
kuraceblaj malsanoj. Kuracado dum 15 tagoj : 15 fr. (Dieta eldonita senpage)

REŬMATISMOJ

forigitaj per SPECIALA « TISANE ». Kuracado
dum tri semajnoj : 15 fr. Repaga sendo.

Skribi :

FARMACEJO CENTRA SAINT-LEU

Strato Saint-Leu - AMIENS

Tel. 22-83